revuo
esperanto

decembro 1966
59-a jaro
n-ro 733 (12)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

PROPONO AL U.N.

OKAZE DE LA JARO DE INTERNACIA KUNLABORO

Donante plenan apogon al la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj progresigi la kunlaboradon inter la popoloj kun la celo dispeli internaciajn tensiojn kaj firmigi la mondan pacon; sed profunde konvinkitaj, ke la lingvodiverseco prezentas unu el la plej gravaj obstakloj al plua intensigo kaj vastigo de internacia kooperado sur ĉiuj niveloj; prenante en konsideron la Rezolucion de la 10-a de decembro 1954 per kiu la Ĝenerala Konferenco de Unesko rekonis "la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo";

ni nun proponas, ke Unuiĝintaj Nacioj solvu la lingvan problemon per efektiva kaj efika helpo al disvastigo de la neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto, rekomendante ankaŭ al la Ŝtatoj-Membroj progresigi ĝian instruadon kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj.

usona numero

ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

185 Transdono de la Propono al UN (Lapenna)

188 Okazaĵoj ĉirkaŭ la transdono (Vermaas)

193 Al la usona esperantistaro

194 Memorando al UN kaj registaroj de Ŝtatoj-Membroj

195 Detaloj pri kotizoj

197 Ni ankoraŭ kolektu subskribojn !

198 Recenzoj

199 Ricevitaj eldonaĵoj

200 La Juna Vivo

201 Mallongaj novaĵoj

202 52-a Universala Kongreso, Tel Aviv, 1967
Komuniko de la prezidanto
Kie legi la prelegojn de la I.S.U.

203 Oficiala informilo 396
Heredaĵo Ravestein-Basters
La internaciaj konkursoj 1966
Esperanto en radio

204 Anoncetoj

kovrila bildo La Propono al U.N.

fotojn liveris

189 Leo Rosenthal

190 D. Frezzolini

191 Jerry Soalt

193 Leo Rosenthal

201 Hans Manske

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

esperanto
decembro 1966

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa marĝeno.

Bankisto de U.E.A.:
Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1967): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:
0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 83 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Bliesskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.

TRANSDONO DE LA PROPONO AL U.N.

Mallonga komuniko en la novembra numero de "Esperanto" koncize informis pri la transdono de la Propono pri la solvo de la lingva problemo al la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj. Nun estas eble priskribi kelkajn detalojn, tute speciale rilate la formon en kiu la Propono estis prezentita.

Konsisto de la delegacio

Konforme al la decido de la Estraro, la delegacio de UEA, kiu transdonis la Proponon, konsistis el 7 personoj. En ĝi troviĝis, krom la subskribinto, f-ino M. H. Vermaas, la direktorino de la C.O. en Rotterdam; s-ro Eskil Svane, sekretario ĉe la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, Danlando, kaj membro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA; s-ro Fr. Helmuth, konstru-entreprenisto, prezidanto de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko; s-ro Mark Starr, eksperto pri laborista edukado, kunlaborinto en ŝtataj komitatoj pri laborista edukado, estinta konsilisto de la Internacia Organizo de Laboro, prezidanto de la Esperanta Inform-Centro en New York; s-ro John Lewine, membro de la Konsulta Komitato por Fremdaj Lingvoj en la Departemento de Edukado de la urbo New York, sekretario de la Amerika Instituto de Francujo, prezidanto de la Esperanto-Societo en New York; s-ro Alexander Schwarz, tradukisto en la traduka servo de la Sekretariato de U.N., prezidanto de la Esperanto-Klubo ĉe la Sekretariato de U.N. kaj reprezentanto de la junulara sekcio de UEA.

Kiel oni vidas, laŭ sia konsisto la delegacio estis maksimume reprezenta kaj reflektis ĉiujn tavolojn de la vasta strukturo de UEA: ekde la centraj organoj de la Asocio ĝis la Esperanto-Klubo en la koro mem de U.N.

Antaŭ la transdono okazis pluraj kunvenoj en la Informa Centro en *Fifth Avenue* en New York, kie la Centro havas tre taŭgan ejon. Granda kunveno de ĉiuj membroj de la delegacio okazis la 4-an de oktobro vespere. Ĝi priparolis ĉiujn detalojn de la transdono.

Akcepto kaj transdono

La membroj de la delegacio kolektiĝis la 6-an de oktobro iom antaŭ la 11.30 matene en la halo de la Sekretariato. Oficisto de U.N. kondukis la delegacion al la 38-a etaĝo, kie troviĝas la ĉambro de s-ro Chakravarthi V. Narasimhan, Vic-sekretario kaj ĉefo de kabinedo de la Ĝenerala Sekretario de U.N., U Thant. En la antaŭĉambro jam troviĝis la oficiala fotografisto de la Sekretariato, s-ro Rosenthal, fotoĵurnalistino de la Presagentejo Transmondo kaj fotografisto de United Press, s-ro Frezzolini (kiu nun lernas Esperanton). Precize je la 11.30 s-ro Narasimhan, kiu estas ŝarĝita pri la aferoj de la Ĝenerala Asembleo, venis el sia ĉambro kaj tre afable invitis la delegacion eniri. La subskribinto prezentis unue sin mem kaj poste ĉiujn membrojn. Laŭ la peto de la fotistoj oni tuj faris plurajn fotojn, kaj la konversacio efektive komenciĝis jam dum la fotado.

La subskribinto enkonduke menciis la kontribuon de UEA al la Jaro de Internacia Kunlaboro. Rezulte de la agado de UEA, kiu laboris laŭ speciala plano por la JIK, almenaŭ 50 milionoj da personoj estis en tiu aŭ alia formo sciigitaj pri la celoj de la JIK, pri la laboro de U.N. kaj de diversaj specialigitaj organizaĵoj. Dum la JIK montriĝis ankoraŭfoje, ke sen la solvo de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj ne estas imagebla pli vasta kaj pli profunda kunlaborado de la popoloj sur ĉiuj kampoj. Tiu fakto troviĝas en la bazo de la iniciato de UEA, ke U.N. solvu la lingvan problemon.

En tiu momento s-ro Narasimhan interrompis kaj diris, ke ankaŭ homoj, kiuj parolas la saman lingvon, ofte malkonsentas kaj ke nacioj uzantaj la saman lingvon ne ĉiam havas la samajn idealojn.

Je tio la subskribinto respondis, ke pri tio tute ne temas. Neniu estas tiel naiva, ke li pensus, ke ĉiuj malfacilaĵoj, malkonsentoj kaj streĉitecoj venas de la lingvodiverseco. Plue: personoj, kiuj ne deziras internacie kunlabori, efektive ne kunlaboros, tute egale ĉu ili parolas aŭ ne parolas la saman lingvon. Temas pri tio, ke tiuj homoj, ĉiam pli multnombraj, kiuj fakte deziras internacian kunlaboradon, ne povas realigi tiun deziron, se ili ne povas kompreni unu la alian. Tio estas esenca. Kaj tio, kompreneble, neniel signifas, ke kunlaborado identas al sameco de ideoj kaj idealoj, aŭ egaligo en senco de unuformeco. Tio tutsimple signifas, ke reciproka komunikado ne estas ebla sen komuna lingvo.

Intertempe finiĝis la fotado, kaj la fotistoj forlasis la ĉambron, en kiu restis nur la Vic-sekretario kaj la membroj de la delegacio. La subskribinto transiris tiam al la granda agado por kolektado de subskriboj je la Propono al U.N. Estis akcentite, ke en relative tre mallonga tempo la Proponon subskribis entute, laŭ la stato je la 3-a de oktobro 1966, 920 954 individuaj personoj kaj 3 843 organizaĵoj kun entute 71 165 532 membroj. La subskribinto atentigis, ke tiuj ciferoj estas pli altaj ol en la Memorando, transdonota fine de la akcepto, ĉar la Memorando estis presita antaŭ kelkaj semajnoj kaj multaj folioj kun amaso da subskriboj venis post tiu tempo kaj daŭre plue atingas la Centran Oficejon de la Asocio. Inter

la individuaj subskribintoj troviĝas 114 membroj de registaroj kaj unu ŝtatestro; 1359 membroj de parlamentoj; 995 lingvistoj kaj filologoj; 6932 membroj de Akademioj kaj profesoroj aŭ docentoj en universitatoj; preskaŭ 52 000 profesoroj kaj instruistoj en mezgradaj kaj elementaj lernejoj ktp. Laŭ nia scio, ĝi estas la plej granda kaj plej impona Propono iam ajn prezentita en la tuta kultura historio de la homaro al internacia instanco surbaze de privata iniciato.

Post tio la subskribinto legis la tekston mem de la Propono kaj diris, ke, laŭ la deziro de la Sekretariato, la delegacio ne transdonos la tutan abundegan materialon, sed nur la liston de la plej gravaj individuaj kaj kolektivaj subskribintoj kun ĉ. 300 fotokopiaj folioj entenantaj ĉ. 1 500 subskribojn de la menciitaj plej elstaraj unuopuloj kaj plej gravaj organizaĵoj.

Sekvis konciza prezento de la starpunkto de la subskribintoj kaj de UEA, laŭ la Memorando transdonita al s-ro Narasimhan fine de la akcepto kune kun aliaj dokumentoj. La elirpunkto estas la lingva problemo en la hodiaŭa mondo, kiu malhelpas komunikadon sur ĉiuj kampoj, inkluzive la personajn kontaktojn de ordinaraj homoj sur internacia nivelo. La subskribintoj de la Propono ne estas kontraŭaj al la lernado de fremdaj naciaj lingvoj. Ili nur realece konstatas, ke la lernado en la nunaj formoj, kiam oni devigas gelernantojn, eĉ la plej sentalentajn por la lingvostudo, lerni diversajn fremdajn naciajn lingvojn, estas neta perdo de tempo. La ĝenerala lernado de la Internacia Lingvo en la lernejoj ne nur radikale solvus la lingvan problemon, sed ankaŭ helpus la gelernantojn pli bone kompreni kaj mastri sian gepatran lingvon, stimulus la lernadon de aliaj objektoj, precipe de geografio kaj historio, kaj faciligus la lernadon de fremdaj naciaj lingvoj al tiuj junaj homoj, kiuj efektive havas kaj talenton kaj emon por tio. La lingva problemo hodiaŭ havas almenaŭ kvin ĉefajn aspektojn, pri kio troviĝas abundaj informoj en la aldono B al la Memorando. Unu el tiuj aspektoj estas la ekonomia. La prezo, kiun la homaro devas pagi pro la multlingveco en la nuntempaj kondiĉoj estas grandega. Apenaŭ necesas tion diri al la Vicsekretario de U.N. Laŭ la dokumentoj publikigitaj antaŭ nelonge de la Sekretariato mem, tiuj kostoj por tradukado kaj interpretado en U.N. estas vere ŝokaj. Sufiĉas memorigi, ke la kostoj de tradukado kaj interpretado por nur unu Sesio de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de U.N. estis preskaŭ duono de miliono da dolaroj. En tiaj kondiĉoj la lingva problemo fariĝas brulanta kaj urĝe solvenda per la sole ebla solvo, nome per la Internacia Lingvo.

La subskribinto finis sian eksplikon per legado de la konkludaj rimarkoj de la Memorando. Li aparte emfazis la jenan parton, kiu prezentas la firman kaj absolute senkompromisan pozicion de UEA:

"En la nomo de ĉiuj subskribintoj kaj en sia propra UEA petas la Ĝeneralan Sekretarion de U.N. entrepreni la necesajn paŝojn por doni sekvon al la Propono, kaj la registarojn de la Ŝtatoj-Membroj apogi ĝian progresivan realigon. Se montriĝos, ke estas necese studi la tutan problemon en aparta komisiono antaŭ ol fari la finan decidon, UEA insistas, *ke en tiu komisiono troviĝu kiel egalrajtaj membroj almenaŭ kelkaj alte kvalifikitaj specialistoj pri lingvoscienco, pedagogio, internaciaj rilatoj, eventuale aliaj branĉoj, kiuj krom tio plene regas la Internacian Lingvon. Iliajn nomojn UEA komunikos en kiu ajn momento.*"

Memorando kaj aldonaj dokumentoj

La delegacio transdonis al s-ro Narasimhan jenajn dokumentojn: liston de la membroj de la delegacio; liston de la transdonitaj dokumentoj; 300 fotokopiojn, lukse binditajn en formo de du grandaj ledaj dosieroj, entenantajn ĉ. 1 500 subskribojn de la plej elstaraj unuopuloj kaj plej gravaj organizaĵoj; liston de la menciitaj individuaj kaj kolektivaj subskribintoj; statistikan resumon pri ĉiuj individuaj subskribintoj (laŭ la 12 kategorioj de profesioj kaj okupoj) kaj de ĉiuj organizaĵoj; presitan Memorandon en la lingvoj angla, franca, hispana, rusa kaj Esperanto kun la aldonoj: A/ teksto de la Propono en la angla, hispana, franca kaj rusa, B/ Dok. de CED A/II/1 "La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj" en la angla, C/ Dok. CED/7 "Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo Esperanto" en la lingvoj angla, franca, kaj hispana, D/ Dok. de CED B/I/2 "La Eduka Valoro de la Esperanto-Instruado en la Lernejoj" en la angla. La delegacio transdonis ankaŭ aliajn dokumentojn, inter kiuj aparte menciindaj estas la Laborplano de UEA pri la JIK kaj la Raporto pri la rezultoj atingitaj en la JIK.

La delegacio prezentis al s-ro Narasimhan persone, ĉar li estas hindo, la verkon *Malsata Ŝtono* de R. Tagore, kiu aperis kiel la unua publikaĵo en la Serio de UEA "Oriento-Okcidento". Plue, la delegacio transdonis po du ekzempleroj de la verkoj *Dia Komedio* de Dante, *Zamenhof - Creator of Esperanto* de M. Boulton kaj *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*. Unu kompleto de la tri verkoj estis por s-ro Narasimhan, kaj la alia por U Thant.

Sekvis konversacio, dum kiu s-ro Narasimhan diris, interalie, ke la Ĝenerala Sekretario povas nenion iniciati rilate la Proponon. Nur se la Ĝenerala Asembleo aŭ la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro farus iun decidon, laŭ propono de iu Ŝtato-Membro, favore al pritrakto de la afero, la Sekretariato povus formi ian komisionon aŭ komitaton por esplori la demandon. La subskribinto respondis, ke la Ĝenerala Sekretario havas vastajn povojn laŭ la Ĉarto de U.N. kaj laŭ la Interna Regularo de la Ĝenerala Asembleo, inkluzive la rajton

meti en la tagordon difinitajn demandojn. Tamen, en la nuna stadio UEA tute ne insistas pri tio. Ĝi nur deziras, ke la Propono estu komunikita al la Ŝtatoj-Membroj.

Ekestis iom vigla diskuto, kaj fine s-ro Narasimhan deklaris, ke en la tagordo de la nuna Sesio de la Ĝenerala Asembleo troviĝas punkto pri la JIK, kaj eventuale li povus aldoni al la dokumentaro pri tiu punkto plian dokumenton kun koncizaj informoj pri la Propono. Li plue diris, ke jam morgaŭ li klopodos per t.n. oficiala "Gazetara Komuniko" informi pri la Propono. La subskribinto deklaris en la nomo de la delegacio, ke en la nuna stadio tio estas tute kontentiga, kaj li petis, ke s-ro Narasimhan efektive prizorgu kaj la aldonan dokumenton kaj la Gazetaran Komunikon.

Per tio finiĝis la akcepto.

Signifo kaj sekvoj

Ne estas eble antaŭvidi, kiujn sekvojn donos U.N. al la Propono. La administra maŝinaro de U.N. — kiel, cetere, de ĉiuj aliaj interŝtataj organizaĵoj — estas sufiĉe komplika kaj certe ne tre rapida. S-ro Narasimhan plenumis sian promeson rilate la informon en la Gazetara Komuniko, sed sciigis post kelkaj tagoj, ke, repripensinte la aferon, li venis al la konkludo, ke ne estas eble informi la Ŝtatojn-Membrojn pri la Propono. Nun UEA plue traktas tiun esencan demandon kun la Sekretariato kaj insistas, ke la Propono, kiu estis oficiale akceptita de la Sekretariato, estu nepre komunikita al la Ŝtatoj-Membroj de U.N. Energia letero estis sendita al la Sekretariato la 22-an de oktobro kaj respondo estas nun atendata. Por ĉiu okazo UEA ĝustatempe prizorgis, ke la Memorando kun ĉiuj aldonaj dokumentoj estu sendita al la Ŝtatoj-Membroj parte pere de iliaj konstantaj delegacioj ĉe U.N., parte pere de la ambasadoj en Hago, Parizo, Londono. Tio estis farita samtempe kun la transdono de la Propono, kaj multaj ambasadoj jam konfirmis, ke ili plusendis la dokumentaron al siaj respektivaj registaroj. Do, la registaroj de la Ŝtatoj-Membroj jam estas informitaj fare de UEA, sed la Asocio insistos, kiel dirite, ke la Sekretariato de U.N. siavice kaj oficiale informu ilin.

Per la transdono de la Propono finiĝis la unua etapo de tiu grandega klopodo, kiu postulis de ni ĉiuj multe da tempo kaj sindono. La Esperanto-Movado ŝuldas sian dankon al la multnombraj kunlaborantoj en tiu ĉi afero kaj aĵ ĉiuj, kiuj kolektis la subskribojn je la Propono.

La signifo de la agado estas multflanka. Antaŭ ĉio nia celo estis atentigi denove pri la lingva problemo en la mondo kaj pri la solvo, kiun prezentas la Internacia Lingvo. Tiun celon ni atingis tre kontentige: preskaŭ unu miliono da unuopuloj, el kiuj multaj okupas elstarajn poziciojn en la publika vivo, kaj preskaŭ 4000 organizaĵoj estis objektive informitaj pri Esperanto. En ligo kun la kampanjo de subskribado aperis centoj da artikoloj kaj informoj en la gazetaro de multaj landoj, okazis radiodisaŭdigoj kaj intervjuoj, eĉ televidaj programoj. Tio ebligis plian informadon al la vastaj popoltavoloj kaj kaŭzis novan interesiĝon. Okaze de la transdono mem sendube aperis nova ondo da artikoloj kaj informoj en la gazetaro, radio kaj televido. En la nuna momento ankoraŭ mankas la raportoj el diversaj landoj pri tiu aspekto, sed estas tute certe, ke la transdono mem kaŭzis abundan raportadon. En New York la subskribinto havis plurajn intervjuojn, inter la aliaj kun la korespondantoj de la grandaj presagentejoj *Reuter* kaj *United Press,* kun ĵurnalisto de *The New York Times,* kun la reprezentanto de la agentejo *Transmondo,* en la studio de la Radio New York City (disaŭdigo du fojojn la 6-an de oktobro matene) ktp. Ĝis kiu grado tiuj intervjuoj havis efikon, montras ankaŭ la fakto, ke en *Ocean Times* — la ĉiutaga gazeto eldonata sur la ŝipo *Queen Mary* — en la numero de la 3-a de novembro (je granda surprizo de la subskribinto) aperis sufiĉe longa informo kun titolo super tri kolumnoj laŭ la komuniko de *Reuter.* La redaktoro, eksciinte, ke la subskribinto troviĝas inter la pasaĝeroj, petis pri intervjuo, kaj ĝi aperis en la hodiaŭa numero — tiu de la 4-a de novembro — sur la unua paĝo. Eĉ sur la oceano efikas la evento !

La agado en ligo kun la Propono jam donis ankaŭ aliajn pozitivajn rezultojn: difinitan premon je la Sekretariato de U.N. kaj je la registaroj de la Ŝtatoj-Membroj; ekinteresiĝon de la edukaj instancoj en pluraj landoj; plian internan fortikiĝon de tiuj Esperanto-organizaĵoj, kiuj estis aktivaj; ĝeneralan vigliĝon de la Esperanto-Movado.

Kompreneble, nun devos sekvi pluaj paŝoj ĉe diversaj instancoj. Pri tio zorgos la centraj organoj de la Asocio en kunlaboro kun la landaj kaj kelkaj fakaj organizaĵoj. La ĉefa afero estas teni daŭre la interesiĝon vivanta ĝis, eble post kelkaj jaroj, oni donos pozitivan sekvon al la Propono en Unuiĝintaj Nacioj.

Intertempe ni ĉiuj utiligu ĝis maksimumo la ekinteresiĝon de la publiko por altiri al la Internacia Lingvo la amasojn, por instrui ĝin kiel eble plej vaste, por fortikigi niajn organizaĵojn — unuavice UEA, sen kiu ne estas imagebla kiu ajn agado en mondaj kadroj — kaj por krei novajn praktikajn servojn. Tiamaniere, tute senkonsidere al la sekvoj, kiujn donos U.N. al la Propono, ni en ĉiu okazo plue disvastigos la lingvon kaj paralele ampleksigos ĝiajn aplikojn en ĉiuj sferoj de la internacia vivo, unuavice por fakaj celoj. Necesas nur ekspluati la nunan momenton kiel eble plej racie kaj rapide, ĉar tiaj okazoj ne prezentiĝas tre ofte.

Prof. d-ro Ivo Lapenna

OKAZAĴOJ ĈIRKAŬ LA TRANSDONO

La transdono de la Propono kaj la restado de prof. Lapenna en Usono dum ses semajnoj pro profesiaj kialoj donis okazon por aro da aranĝoj, kiuj fakte forrabis tro da tempo de la profesia laboro, sed estis tre valoraj por solidigi la pozicion de Esperanto en Usono kaj doni al la tiea movado novajn impulsojn.

Publika kunveno en Novjorko

Jam kelkajn tagojn post la alveno de prof. Lapenna en Novjorko, la 27-an de septembro, en luksa salono de *Auditorium of Brotherhood in Action,* ĉe la 40-a Strato kaj 7-a Avenuo, okazis publika kunveno, kiu estis vaste diskonigita tra la urbo per gazet- kaj radioinformoj, cirkuleroj ktp kaj al kiu granda nombro da aŭtoritatuloj estis invititaj, inter ili multaj parlamentanoj. Ĉeestis la kunvenon ĉ. 150 personoj, inter kiuj multaj neesperantistoj. Sendis saluttelegramojn i.a. la federala senatano Robert Kennedy kaj 9 membroj de la Federala Kongreso, do parlamentanoj.

La kunvenon malfermis la senlaca gvidanto de la Esperanto-Informcentro, s-ro Mark Starr. Li akcentis, ke li ricevis multajn respondojn de senatanoj, kiuj estis invititaj sed ne povis ĉeesti. S-ro Robert Kennedy letere esprimis sian grandan bedaŭron, ke li ne povas ĉeesti la kunvenon por aŭdi la prelegon de prof. Lapenna, sed li petis transdoni liajn salutojn.

D-ro Humphrey Tonkin, reprezentanto de TEJO en la Estraro de UEA kaj asistento en la universitato de Pennsylvania, prezentis la prelegonton kaj mallonge skizis lian karieron, menciante, ke unue li estis profesoro de internacia juro en la universitato de Zagreb kaj membro-kunlaboranto de la Jugoslavia Akademio de Sciencoj, poste translokiĝis al Londono, okupiĝis pri esplorlaboro, precipe pri Orient-Eŭropa juro, ĉe *London School of Economics and Political Science,* kaj nun estas tie eksterordinara profesoro. Ankaŭ la laboron de prof. Lapenna por Esperanto d-ro Tonkin mallonge resumis, ekde la tempo, kiam li fondis la Akademian Klubon en Zagreb, ĝis li fariĝis prezidanto de UEA.

Prof. Lapenna parolis pri la temo "La lingva problemo en la nuntempa mondo". La prelego estis farita en la angla lingvo, kaj ĝi prezentis la ĉefajn aspektojn de la lingvaj malfacilaĵoj en la nuntempa mondo kaj la solvon, kiun prezentas la Internacia Lingvo. Poste multaj ĉeestantoj utiligis la eblecon fari demandojn, kiujn la parolanto volonte respondis.

La tuta aranĝo estis sur tre alta nivelo kaj lasis bonegan impreson ĉe la partoprenintoj. Inter ili, proksimume la duono estis esperantistoj, kelkaj vojaĝintaj de tre malproksime. Unu el la plej rimarkindaj personoj estis s-ino Cora Fellows, 94-jara, tre vigla, parolanta bonegan Esperanton, kiu ege ĝojis havi la okazon konatiĝi kun la prezidanto de UEA.

La Esperanto-Informcentro: Centro de agado

En la tagoj antaŭ la transdono, la prezidanto de UEA havis multajn kunvenojn, konferencojn kaj intervjuojn, kiuj okazis en la Esperanto-Informcentro, starigita antaŭ nelonge de la landa asocio ELNA. Ĝi estis la centro de la agado kaj ofte similis al abelujo.

La oficejo troviĝas en la ĉefarterio de Novjorko, la Kvina Avenuo, n-ro 156 en la 8-a etaĝo. La ejo ne estas granda, sed havas tre konvenan pozicion kaj estas bone ekipita. Laboras tie libervole kelkaj novjorkaj esperantistoj. La oficejo donas ĉiajn informojn pri la Internacia Lingvo kaj havas telefonan respondservon por la kazo, kiam neniu deĵoras. Estras la oficejon s-ro Mark Starr kun admirinda energio. S-ro Starr estas konata eksperto pri edukado de laboristoj kaj havas sennombrajn utilajn ligojn kaj rilatojn. S-ino Margot Gerson ĉiutage veturas longan distancon de sia loĝejo ekster la urbo por, same, plenumi la ĉiutagajn oficejajn laborojn. Tria fidela deĵoranto estas s-ro Futran, kiu precipe prizorgas la poŝton. Helpas ankaŭ aliaj Novjorkanoj, kiel ekz. s-ino Thea Kohn, kaj la juna Julie Crandall.

Intervjuoj

La Centro estis plena de dinamismo en tiuj tagoj, kaj dank'al sia granda energio prof. Lapenna sukcesis dividi sian tempon inter ĝi kaj la Columbia-Universitato, je kio estas notinde, ke la Universitato estas ĉe la 116-a strato kaj la Centro ĉe la 20-a . . .

Post la publika kunveno de la 27-a la interesiĝo kreskis. Pluraj ĵurnalistoj petis intervjuojn. La korespondanto de Reuter estis atentigita pri la afero el Parizo, ĉar la Informa Fako de UFE faris la unuan komunikon kaj li ricevis instrukcion intervjui la prezidanton. Tio okazis la 5-an de oktobro, kaj la saman tagon en la radiostacio de Novjorko dekminuta intervjuo estis surbendigita kaj dufoje dissendita la morgaŭan tagon. En la fino de la konversacio estis donitaj la adreso kaj telefonnumero de la Informcentro, kaj sekve de tio multaj direktis informpetojn al ĝi.

Antaŭ aŭ post la transdono okazis krome intervjuoj kun la fotopresagentejo *Transmondo,* kun *United Press* kaj la plej grava usona gazeto *New York Times;* plue, kun la konata agentejo *Associated Press* kaj kun la redaktorino de la informbulteno de la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj, *Secretariat News.* Ĉiuj intervjuoj evoluis tre kontentige, ankaŭ en iuj

kazoj, kiam la intervjuanto en la komenco montris kelkajn antaŭjuĝojn, kaj diversaj komunikoj estis publikigitaj.

En la Esperanto-Klubo de Novjorko

La 7-an de oktobro prof. Lapenna kaj f-ino Vermaas parolis en speciale kunvokita kunveno de la Novjorka Esperanto-Klubo. La kutima klubejo montriĝis tro malgranda, kaj oni devis forŝovi moveblan vandon por lokigi ĉiujn. Prezidis s-ro John Lewine, kiu prezentis la parolontojn kaj esprimis sian ĝojon, ke dank' al la transdono de la Propono la novjorkaj esperantistoj havas okazon aŭdi ilin.

Prof. Lapenna parolis pri la transdono, okazinta la hieraŭan tagon, kaj pri ĉio ligita al ĝi. Li aparte atentigis, ke efektive temas pri *propono*, kiun la subskribintoj faras al Unuiĝintaj Nacioj por helpi ĝin solvi la ĉiam pli akriĝantan lingvan problemon, kaj certe ne temas pri *peticio*. La Esperanto-Movado nenion petas, sed havas multon por doni. Aparte reliefigas tion la eksterordinaraj kostoj ligitaj al la multlingveco, pri kiuj lastatempe ciferoj estis publikigitaj.

F-ino Vermaas parolis pri UEA kaj apelaciis al ĉiuj usonaj esperantistoj aliĝi al ĝi kaj daŭre subteni la Asocion, kiu realigas unu iniciaton post alia por la plia disvastigo de la Internacia Lingvo. Ŝi klarigis la diversajn membrokategoriojn kaj akcentis la malaltecon de la kotizoj kompare kun la vivnivelo en Usono.

Poste mallonge parolis pri TEJO d-ro H. Tonkin, veninta el Pennsylvania por ĉeesti la kunsidon. Ankaŭ s-ro F. Helmuth, prezidanto de ELNA kaj fluginta el Kalifornio por partopreni la delegacion, direktis kelkajn vortojn al la ĉeestantoj. Ĉio dirita estis surbendigita fare de unu el la membroj. En siaj dankvortoj al la parolintoj s-ro Lewine akcentis, ke la hodiaŭa programo estas unu el la plej grandaj eventoj en la vivo de la Klubo.

La vortoj de la gastoj montriĝis inspiraj, ĉar en la fino f-ino Vermaas povis akcepti kotizojn de du dumvivaj membroj de UEA kaj plurajn aliajn kotizojn kaj donacojn por UEA.

La novjorka junularo esperantista

Post la programo ĉe la klubo, ĉ. la 23-a horo, ges. Lapenna kaj f-ino Vermaas estis invititaj al neformala kunveno de la novjorka junularo en la apartamento de s-ro Kollin. Tie gaja dudeko da gejunuloj agrable babilis kaj amuziĝis ĉe muziko, trinketo kaj manĝeto. Dum la konversacioj en grupetoj montriĝis ĝenerale tre bona lingvonivelo. Bonega estas tia simpla kaj senĝena junulara amuzado en kaj per Esperanto — ĉar efektive oni aŭdis praktike nur Esperanton kaj ne la anglan — sed ankoraŭ pli bone estus, se flanke de tio ekzistus ankaŭ iu energia kaj pozitiva agado por plua disvastigo de la lingvo en propra junulara medio. Aŭdiĝis iuj kritikoj, ne tute malpravaj, pri la labormetodoj de la pli aĝa generacio, sed ne vidiĝis pli bonaj labormetodoj aplikataj de la junularo por plibonigi la lokan movadon.

La sincereco postulas konstati, ke la tuta ampleksa taskaro fiksita por la laboro ĉe U.N. estis plenumita de la pli aĝa generacio, kiu oferis sennombrajn tagajn kaj noktajn horojn. Estis mezaĝa sinjorino Louise Schmidt, kiu proponis sin por tajpi ĝis la 2-a matene, kiam temis pri grava, urĝege sendenda letero.

Se nur iomete la usonaj gejunuloj transprenus de la pensmaniero de nia japana junularo, tiel senfine helpema kaj laborema, multo povus ŝanĝiĝi. Tio ne estas kritiko, sed konstato en la espero, ke tiu sendube talenta novjorka grupeto — nepre en bona harmonio kun la pliaĝuloj, kiuj tamen ne ĉiuj estas maljunuloj ! — ekaktiviĝu kaj estu instigita formi novan fortan kernon allogantan pli grandan propran

Prof. Lapenna transdonas al s-ro Narasimhan la Proponon kun elektitaj subskriboj kaj aldonaj dokumentoj.

okazaĵoj ĉirkaŭ la transdono

publikon laŭ propra maniero, tiel kreante vastan lokan esperantistaron indan je la novjorka urbego.*

Renkontiĝo kun prof. Mario Pei

Sabaton la 8-an de oktobro prof. Lapenna estis invitita prelegi en la Geolingvista Klubo de Novjorko. Membroj de tiu Klubo estas sciencistoj, kiuj okupiĝas pri la tre speciala temo de internacia komunikado kaj geografia disvastigiteco de unuopaj lingvoj, kio klarigas la nomon de la Klubo. Pro la strikta specialeco — en tuta Usono nur sesdeko da lingvistoj okupiĝas pri ĝi — la publiko estis malgranda, sed ege elektita. Prezidanto de la Klubo estas prof. Mario Pei. La luksa klubejo troviĝas apud Madison Avenue. La subskribinto havis la honoron ĉeesti la kunvenon kiel gasto.

Prof. Pei prezentis prof. Lapenna, kiu poste parolis pri la temo: "La nuna situacio de la Internacia Lingvo en la mondo" kaj prilumis la staton de Esperanto hodiaŭ en la mondo, ĝian konsiderindan disvastigitecon en ĉiuj partoj de la mondo, la prezenton de la Propono al U.N., la nombron kaj kvaliton de la subskribintaro.

La prelego en tiu ĉi medio de lingvistoj kaj universitataj profesoroj estis eksterordinare valora. El la postaj demandoj montriĝis ne nur, kun kia profunda interesiĝo kaj scivolo oni aŭskultis ĝin, sed ankaŭ, ke oni plene akceptis la klarigojn de prof. Lapenna kiel tiujn de kolego-lingvosciencisto kaj ne hezitis peti de li pliajn informojn pri la lingvo mem kaj pri ĝia pozicio en la kadro de lingvoscienco. La diskuto evoluis sur tre alta nivelo en sfero de plena egaleco. Se oni pripensas, ke plurfoje iuj lingvistoj humiligis eĉ Zamenhof mem, superece nomante lin amatoro, ĉar li ne estis profesia lingvosciencisto, oni konscias, kiel valora estas la scienca objektiveco de tiu ĉi societo.

Prof. Pei en siaj konkludaj vortoj atentigis, ke laŭ lia opinio la lingvoproblemo en la hodiaŭa mondo estas brulanta, ke neniu nacia lingvo povas doni kontentigan solvon por ĝi, sed ke nur internacia lingvo povos plenumi tiun bezonon. Preskaŭ ĉiusemajne li ricevas informojn kaj flugfoliojn pri iuj novaj projektoj de internacia lingvo. La kompilintoj petas lian opinion por povi poste utiligi lian nomon por sia propagando, sed al ĉiuj li donas la saman respondon, ke jam ekzistas lingvo plene funkcianta, kaj ke do ĉiuj pliaj klopodoj estas nur perdo de tempo kaj mono.

---

* Kun plezuro ni povas aldoni, ke la 29-an kaj 30-an de oktobro okazis speciala semajnfina seminario de JEN (Junulara Esperantista de Nordameriko), nur por gvidantoj de la usona junulara movado. La tre elstaran aranĝon, en kiu interalie prelegis prof. Lapenna pri la Principaro de Frostavallen, ĉeestis deko da gejunuloj-gvidantoj el pluraj urboj. Oni kunvenis en la Inform-Centro.

Membroj kaj helpantoj de la delegacio ekster la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj. De maldekstre: s-ino Lapenna, s-ro Helmuth, f-ino Vermaas, prof. Lapenna, s-ro Lewine, s-ino Gerson, s-ro Starr.



En kunveno de la Nov-Jorka Esperanto-Klubo prof. Lapenna salutas 94-jaran s-inon Cora Fellows. Dekstre staras d-ro Tonkin. Apud s-ino Fellows sidas s-ino Thea Cohn, kiu gvidas kurson de Esperanto en la Sekretariato de UN, kaj s-ro Teodoro S. Ŝvarc, aŭtoro de "Maskerado ĉirkaŭ la morto".

Post tio prof. Pei fermis la kunsidon. Je la adiaŭo ĉiuj aparte gratulis kaj dankis al prof. Lapenna pro lia prezento de tiel interesa temo.

Prelego en universitato

Vizitante por sia profesia laboro plurajn universitatojn en aliaj urboj, prof. Lapenna estis invitita fari prelegon pri Esperanto en la universitato de Alderston, norde de Novjorko. Organizis la tuton prof. Ring, bonega esperantisto kaj membro de UEA, ligita al tiu universitato. La prelegon ĉeestis ĉ. 200 studentoj, kiuj montris grandan intersiĝon. Kurso por la studentoj estas nun funkcianta. Baldaŭ Esperanto fariĝos regula studobjekto (elektebla) en la oficiala programo.

Familia aranĝo en Washington

En Washington, malgraŭ ega okupiteco en la Universitato, prof. Lapenna povis akcepti inviton de la Esperanto-Klubo paroli en malgranda kunveno en la domo de ĝia prezidanto, d-ro J. Lieberman. Bedaŭrinde, oni povis atingi ne ĉiujn membrojn, tiel ke ĉeestis apenaŭ deko da ili. Laŭ peto de la prezidanto prof. Lapenna informis pri la transdono de la Propono kaj donis siajn impresojn pri Usono ĝenerale kaj pri la tiea Esperanto-movado speciale. La lastan punkton la parolanto pli detale analizis, klarigis la neceson nepre studi en la kluboj la Laborplanon de UEA kaj la Principaron de Frostavallen kaj agi laŭ ili, priparolis la vastan agadon de UEA, kiu povas esti fruktodona nur kun la kunlaboro kaj apogo — ankaŭ financa — de la Esperanto-asocioj kaj kluboj ĉie en la mondo.

Kun streĉa atento oni aŭskultis la vortojn de la prezidanto de UEA kaj ĉerpis novan inspiron el ili, tiel ke jam antaŭ la adiaŭo d-ro Lieberman fiksis kun s-roj Davis, Docal, Nace kaj kelkaj aliaj malgrandan laborkunsidon por studi la problemojn kaj fari planojn por laŭgrada plifortigo de la loka movado. Samtempe f-ino Vermaas jam povis akcepti kelkajn kotizojn kaj donacojn por UEA.

Telefonado kun Kalifornio

Kelkajn tagojn post la transdono ĉe U.N. la prezidanto de ELNA reflugis al Kalifornio. Tie okazis la 22-an de oktobro regiona kunveno kun ĉ. 150 ĉeestantoj el 21 lokoj. S-ro Helmuth aranĝis, ke per telefonalvoko el Novjorko je aparta numero prof. Lapenna povis alparoli tiun kunvenon precize je la 20-a horo, loka tempo. Pere de speciala laŭtparolilo lia voĉo atingis ĉiujn angulojn de la tiea salono.

Tiel okazis, ke precize je la 23-a horo — ĉar estas trihora tempodiferenco — en la Informcentro ĉe *Fifth Avenue,* en ĉeesto de areto da novjorkaj esperantistoj, la prezidanto de UEA faris ĉe la telefono duonhoran paroladon al la Kalifornianoj, en kiu li, same, tuŝis la transdonon kaj ĝian signifon, la usonan movadon kaj la neceson ĉiel subteni UEA. La paroladon respondis longega aplaŭdo. S-ro Helmuth diris, ke ĉiuj ĉeestantoj bonege povis ĝin aŭdi, kaj li tre dankis al prof. Lapenna, ke malgraŭ sia okupiteco li estis preta fari tiun paroladon.

Dua renkontiĝo kun prof. Mario Pei

Tiun saman tagon, en la posttagmezo, la prezidanto de la Novjorka Klubo — pro sia profesio ankaŭ membro de la Geolingvista Klubo — invitis prof. Lapenna kaj f-inon Vermaas al teo en sia hejmo, al kiu estis invitita ankaŭ prof. Mario Pei. Tie, en la agrabla apartamento de gesinjoroj Lewine, prof. Lapenna kaj prof. Pei havis okazon pli persone konversacii kaj interŝanĝi ideojn. Montriĝis denove, ke ankaŭ prof. Pei vidas la solvon de la monda lingvoproblemo sole pere de Esperanto. En la daŭro de la tre interesa konversacio prof. Lapenna tuŝis la planojn de UEA por la eldono de altnivela revuo pri la lingvoproblemo. Prof. Pei montris sin tre interesita pri la ideo kaj donis kelkajn valorajn sugestojn. Ĉi tiu dua kontakto multe plifirmigis la rilatojn inter ambaŭ sciencistoj.

La valoro de CED por la agado

Aparte grava montriĝis, dum la tuta restado en Usono, en la kontaktoj kun ĉiaj personoj kaj instancoj ekster la movado, la grandega valoro de la laboro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado. Fakte, sen la dokumentoj de CED, ne nur aldonitaj al la Memorando sed ankaŭ daŭre prezentitaj en oportunaj okazoj al aŭtoritatuloj, sciencistoj kaj ĵurnalistoj, estus maleble fari ĉi tiun tutan agadon sur la necesa nivelo kaj kun la necesa prestiĝo.

Ĝenerale, la esperantistoj trovas jam tute ordinara, ke CED ekzistas, tiel ordinara, ke ili forgesas ĝian ekzistadon, forgesas utiligi ĝiajn dokumentojn por sia informa laboro, forgesas subteni ĝin, forgesas, ke ankaŭ tiun taskon plenumas prof. Lapenna kun siaj kunlaborantoj — per ridinde malaltaj financaj rimedoj, cetere.

Ampleksega laboro plenumita

Krom ĉio ĉi-supre menciita kaj krom ĉio ligita al la transdono de la Propono al U.N., pri kio oni legas raporton aliloke, prof. Lapenna havis, kompreneble, ankoraŭ aron da malgrandaj renkontiĝoj kun esperantistoj, ĵurnalistoj kaj aliaj personoj, ĉiuj agrablaj kaj utilegaj, ĉu por nia afero ĉe U.N., ĉu por la usona movado speciale, tamen ĉiuj ankaŭ daŭre forrabantaj tempon destinitan por la devigaj profesiaj studoj kaj prelegoj ne nur en Columbia-Universitato, sed ankaŭ en la universitatoj de Yale, Harvard, Alderston, Washington k.a. Ke ĉio ĉi estis ebla, ke li sukcesis tamen plenumi ankaŭ ĉiujn profesiajn taskojn ĝis la momento de reveturo al Londono, tio estas klarigebla nur per kelkaj difinitaj faktoj: lia propra tre rapida labormaniero, lia forta fizika eltenemo, kiu permesas fini nokte tion, kio ne povas esti finita dumtage, la ĉeesto de lia edzino — ja la sekretariino de CED havanta similan eltenemon — kiu malpezigis la ŝarĝon per centoj da grandaj kaj malgrandaj helpoj, kaj, ĉefe kaj tute speciale, tiu komplekso de ecoj, kiun tiel klare priskribis la vic-prezidanto de UEA, s-ro Erik Carlén, en siaj dankvortoj dum la Ferma Kunsido de la Kongreso en Budapest, kaj tiu firma sinteno montriĝanta el lia tiama respondo al tiuj vortoj.

Sekvu ĉi tie tiuj vortoj eldiritaj en Budapest, tiel plene pravigitaj de ĉio ĵus okazinta en Usono. La magnetofona bendo reproduktis jenajn vortojn de s-ro Carlén, diritajn la 6-an de aŭgusto pasinta:

"Mi konas viron, kiu havas riĉe dotitan intelekton kun alta inteligento, klarvida kaj saĝa. Li havas sciencan edukadon kaj povas pensi science. Sed li ankaŭ havas grandan laboremon kaj la plej grandan laborkapablon. Krom tio, li scias la arton de homa kunlaborado. Mi povas diri al vi, ke tiaj homoj estas ege maloftaj. En mia entrepreno mi ofte serĉis tiajn homojn. Ni havas tian inter ni. Sian tutan energion, sian tutan talenton li fordonas al Esperanto kaj al la Esperanto-movado. Almenaŭ mi, kiel ordinara modesta esperantisto nur povas esti fiera kaj humile danka. Por tiu ĉi Kongreso li faris pli multe, ol la plej multaj el vi povas imagi. Mi malkaŝos lian nomon, li estas nia prezidanto, profesoro Ivo Lapenna."

Karakteriza estis la respondo:

"Mi daŭrigos tiel labori, ĝis miaj fortoj permesos al mi, kaj mi esperas, ke mi havos la helpon kaj apogon de ĉiuj pozitivaj fortoj en la Esperanto-movado, ĉu de tiuj, kiuj estas en tiu ĉi salono, ĉu de tiuj, kiuj ne estas ĉi tie. Agante tiel, komune, harmonie, ni certe iros paŝon post paŝo antaŭen, kaj ni kondukos nian aferon, se ne al la fina celo, do certe tre proksime al ĝi jam en tiu ĉi generacio."

Al la vortoj de s-ro Carlén ni povus nun aldoni: "Por la agado ĉe U.N. li faris pli multe, ol la plej multaj el vi povas imagi." Kelkajn el tiuj paŝoj, kiujn aludis prof. Lapenna, grandajn kaj firmajn, li ĵus faris en Novjorko. Ĉiuj el ni ebligu al li, per apogo, helpo kaj celtrafa laboro, fari ankoraŭ multajn pliajn tiajn paŝojn sur la sama vojo, kaj ĉiu el ni subtenu lin per fideleco kaj lojaleco, por ke ni ankoraŭ longe konservu lin por la Asocio.

M. H. Vermaas

AL LA USONA ESPERANTISTARO

Usono estas granda lando. En multaj sencoj.Ni ĉiuj scias tion. Tamen, oni devas pasigi tie almenaŭ kelkan tempon por povi ĝin senti. Iam, se la tempo permesos, mi klopodos priskribi pli detale miajn impresojn.

En la nuna momento mi nur diru, ke multo vidita postlasis ĉe mi profundajn markojn.
Sur la kultura kampo neforgeseblaj estas la arkitekture belega Lincoln Centro en New York kun plej altnivelaj operaj prezentoj kaj koncertoj; la admirindaj kolektoj de pentraĵoj diversloke, precipe en la Nacia Artgalerio en Washington; la senfina libraro en la Biblioteko de la Kongreso - la plej granda en la mondo - same en la ĉefurbo.

La scienca kaj eduka laboro en la vizititaj universitatoj - Columbia, Yale, Harvard kaj George Washington - estas impona kaj almenaŭ parte imitinda.

Multaj aspektoj de la materia civilizacio atingis la suprojn de komforto kaj aŭtomatigo. Por mia gusto eble eĉ iom tro: se oni tiel daŭrigos, baldaŭ oni forgesos paŝi kaj ne plu distingos la jarsezonojn.

En la amaso da "plejoj" aplikeblaj al Usono, la ĝentileco certe ne okupas la lastan lokon. Mi ne

La prezidanto de UEA klarigas al s-ro Narasimhan la esencon de la Propono de UEA. Maldekstre: s-roj F. Helmuth kaj A. Schwartz. Dekstre: s-ro M. Starr, f-ino M. H. Vermaas, s-roj E. Svane kaj J. L. Lewine.

pensas nur pri la plej afabla akcepto en la universitatoj aŭ en la Esperanto-medioj, sed ankaŭ pri la helpemo de nekonatoj surstrate, en trajnoj, ĉie.

Usonon ja oni devas sperti por povi plene aprezi ĝiajn pozitivajn flankojn kaj kompreni iujn el ĝiaj malfacilaĵoj.

Kion diri pri la Esperanto-Movado?

Certe, ĝi ankoraŭ ne estas tiel forta, kiel ĝi povus esti. Tamen, gravaj progresoj estas faritaj en la lasta tempo. Organize, la landa asocio, ELNA, fortikiĝis. Ĝin gvidas sindonaj, kleraj, larĝmensaj personoj kun digno kaj reputacio, sub la lerta prezido de Fr. Helmuth. La Centro en la mondfama Kvina Avenuo, en la koro mem de New York, estas grandega akiro, nepre subteninda. Pri ĝi ĉefe okupiĝas la malnova, sed ĉiam juna aktivulo Mark Starr kun aro da agemaj kunlaborantoj. Fine, la junulara Esperanto-Movado, kiu ĝis antaŭ nelonge praktike ne ekzistis en Usono, faris la unuajn firmajn paŝojn.

Tiuj tri faktoj, sendube pozitivaj, prezentas solidan bazon por plua serioza laboro. Por ke ĝi estu kiel eble plej efika kaj donu maksimume pozitivajn rezultojn; necesas, laŭ mia opinio, ke la esperantistaro de Usono konsideru jenajn sugestojn: (I) daŭre praktiki la lingvon ne nur en la Esperanto-organizaĵoj, sed ankaŭ aliloke, kiam ajn prezentiĝas okazo por tio, kun la celo plibonigi la lingvan nivelon; (II) ellabori kaj poste observi agadprogramojn konforme al la Dua Laborplano de UEA; (III) sur la kampo de informado dediĉi pli da atento al la Principaro de Frostavallen; (IV) evoluigi pli fortajn ligojn inter ELNA kaj la centraj organoj de UEA; (V) konsiderinde altigi la nombron de Membroj-Abonantoj de UEA.

La unuajn kvar punktojn ni vaste pridiskutis en New York. Rilate la lastan - sed esence gravan por la plenumo de la aliaj - mi direktas la plej varman alvokon al tiuj geamikoj en Usono, kiuj ankoraŭ ne estas individuaj membroj, aliĝi tuj kiel Membroj-Abonantoj de UEA aŭ en pli alta kategorio. Pluraj povos certe fariĝi eĉ Dumvivaj Membroj kio, unuflanke, ŝparos al ili la tempoperdon en ligo kun la ĉiujara renovigo de la membreco, kaj, aliflanke, helpos al la administrado de la Centra Oficejo. Krome, la pli bonstataj eble konsideros la eblecon helpi al la laboro de CED per financa subteno. Ĉiu, eĉ la plej modesta donaco, estas bonvena, ĉar

Ĉi-sube ni publikigas por informo al niaj legantoj la precizan tekston de la Memorando, kiu akompanis la Proponon al Unuiĝintaj Nacioj en la lingvoj angla, franca, hispana, rusa kaj Esperanto.

Transdonante al Unuiĝintaj Nacioj la Proponon por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj, Universala Esperanto-Asocio (UEA) havas la honoron prezenti kelkajn esencajn faktojn, interpreti la dezirojn de la subskribintoj kaj formuli sian starpunkton en la sekvanta konciza

MEMORANDO

Al UNUIĜINTAJ NACIOJ kaj REGISTAROJ DE LA ŜTATOJ-MEMBROJ

1. **Kontribuo de UEA al JIK.** - Konforme al la Rezolucio de UN A/RES/1844 (XVII) de la 11-a de januaro 1963 kaj la rilatantaj postaj dokumentoj, Universala Esperanto-Asocio, la landaj kaj fakaj organizaĵoj apartenantaj al ĝi kaj ĝia tuta membraro en 85 landoj efike plenumis specialan ampleksan Laborplanon de UEA por la Jaro de Internacia Kunlaboro. Raporto kun ĉiuj detaloj pri la plenumo de la Laborplano estis sendita al la Ĝenerala Sekretario de UN per letero de la 22-a de aprilo 1966, kaj poste distribuita kiel Dokumento I/VII/5 de la Centro de Esploro kaj Dokumentado en Londono. Rezulte de tiu multflanka agado sur la internacia kaj nacia niveloj "almenaŭ 50 milionoj da personoj estis en tiu aŭ alia formo objektive informitaj pri la JIK kaj pri la ĉefaj aspektoj de la laboro de Unuiĝintaj Nacioj" (Dok. I/VII/5,p.6). Per sia rimarkinda kontribuo al la celoj de la JIK la Esperanto-Movado, organizita en la politike neŭtrala Universala Esperanto-Asocio, ankoraŭfoje manifestis sian firman apogon al ĉiuj klopodoj dispeli internaciajn tensiojn, kaj sian fidon je la idealoj de interpopola kompreniĝo, internacia kunlaborado kaj monda paco.

2. **Propono al UN.** - Inter la aliaj agadoj entreprenitaj en 1965, UEA iniciatis ankaŭ kolektadon de subskriboj je Propono, kies teksto estas aldonita sub A/. En mallonga tempo de iom pli ol unu jaro la Proponon subskribis entute 912 463 individuaj personoj, inter kiuj 114 ŝtatestroj kaj membroj de registaroj, 1 357 parlamentanoj, 993 lingvistoj kaj filologoj, 6 879 Nobelpremiitoj, membroj de sciencaj akademioj, institutoj kaj profesoroj de universitatoj, 6 620 verkistoj, artistoj kaj ĵurnalistoj, 51 674 instruistoj, 844 826 apartenantoj de aliaj profesioj, kiel ankaŭ 3 813 organizaĵoj kun entute 64 milionoj da membroj.

La tuta materialo rilate la Proponon estas ordigita kaj klasigita, tiel ke oni povas facile kontroli ĉiun unuopan subskribon ĉu de individuoj ĉu de organizaĵoj. Pro la amplekso kaj pezo de la materialo la Sekretariato de UN esprimis la deziron akcepti la Proponon nur kun preciza resumo de ĉiuj subskriboj laŭ la 12 kategorioj kaj kun apartaj listoj de la plej elstaraj individuaj subskribintoj kaj de la plej gravaj organizaĵoj. La cetera materialo troviĝas plue en la Centra Oficejo en Rotterdam kaj povas esti en ĉiu ajn momento aŭ transdonita al la Sekretariato

de UN aŭ kontrolita en la Centra Oficejo de UEA ĉu de reprezentantoj de UN ĉu de rajtigitoj de la Ŝtatoj-Membroj.

3. **Lingva Problemo.** - En la nuna epoko de giganta teknika progreso kaj ĉiurilata interdependeco de la mondo, la internaciaj kontaktoj ĉesis esti privilegio de malmultaj kaj fariĝis rajto de la vastaj popolamasoj. La lingvo-diverseco transformiĝis el simpla ĝeno por kelkaj en gravan internacian problemon por ĉiuj. En tiaj kondiĉoj la lingvaj baroj prezentiĝas kiel la ĉefa obstaklo al adekvata internacia komunikado sur ĉiuj kampoj, inkluzive la personajn rilatojn de ordinaraj homoj, kio siavice malhelpas aŭ ofte eĉ malebligas la plenan utiligon de sciencaj atingoj, la ampleksigon de kulturaj interŝanĝoj kaj la pluan evoluigon de internacia kompreniĝo. Estas konata la fakto, ke la lernado de diversaj fremdaj naciaj lingvoj — malgraŭ la grandaj fortostrecoj, tempo kaj materiaj rimedoj dediĉitaj al tiu celo — donas nur tre modestajn rezultojn (kutime eĉ ne pasivan lingvoscion) kaj en ĉiu okazo neniel sukcesis solvi la kompleksan kaj daŭre akriĝantan lingvan problemon en ĝia tuteco, nome en ĉiuj sferoj de la nuntempa internacia vivo en mondaj kadroj. La sistemo de oficialaj kaj t.n. laboraj lingvoj — ĉiam pli multnombraj kaj ne ĉiam la samaj — en diversaj registaraj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj ne nur ne solvas kontentige la demandon eĉ por la limigitaj bezonoj de la koncernaj organizaĵoj, sed ankaŭ kontraŭas la principon de egaleco de ĉiuj nacioj, grandaj kaj malgrandaj. Tial la adopto de la neŭtrala Internacia Lingvo (Esperanto) konforme al la Propono respondas al la bezonoj de la moderna homo en la kosma erao kaj prezentas la sole racian, justan kaj radikalan solvon de tiu ĉi problemo en ĉiuj ĝiaj aspektoj: pure teknike-lingva, socia, psikologia, politika kaj ekonomia. Informoj pri la lingva problemo en la nuntempaj internaciaj rilatoj troviĝas en la Dok. A/II/1 aldonita sub B/ en la angla lingvo.

4. **Bazaj Faktoj pri Esperanto.** - La Internacia Lingvo (Esperanto) estas neŭtrala, vere internacia laŭ siaj konsistaj elementoj kaj tial facile ellernebla por ĉiuj nacioj. Personoj parolantaj tiun lingvon troviĝas en ĉiuj mondopartoj. Elprovita ĉiuflanke en multjara praktiko, ĝi montriĝis kiel nuancita kaj absolute taŭga instrumento de internacia komunikado. En la Dok. CED/7, aldonita sub C/ en la nuntempaj internaciaj rilatoj troviĝas en la Dok. faktoj pri la formiĝo, strukturo, literaturo kaj ĉefaj aplikoj de la lingvo. En tiu dokumento troviĝas ankaŭ la teksto de la Rezolucio de Unesko de la 10-a de decembro 1954, menciita en la Propono (p.7), la ĉefaj reprezentantoj de UEA en diversaj landoj (p.8) kaj resumo de la gramatiko de Esperanto (p.9). La paĝindikoj rilatas al la eldonoj angla kaj franca.

5. **Naciaj Lingvoj kaj Esperanto.** - La proponita solvo de la lingva problemo en la mondo per la neŭtrala Esperanto neniel celas malgravigi la scion de fremdaj naciaj lingvoj, nek ĝi estas direktita kontraŭ la libervolan lernadon de tiuj lingvoj en kiu ajn senco. La ĝeneraliĝo de la Internacia Lingvo en la internaciaj rilatoj ne malhelpus, ke ĉiu nacio, depende de sia geopolitika pozicio kaj de siaj konkretaj bezonoj, dediĉu laŭ sia bontrovo al tiu aŭ alia fremda nacia lingvo apartan atenton en siaj lernejoj kaj ebligu al personoj kun speciala talento por lingvoj ellerni laŭdezire kiun ajn alian lingvon. Eĉ tiurilate la scio de Esperanto povas nur helpi, kiel evidentigis la enketo farita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado en 1964.

(daŭrigo sur sekvanta paĝo)

al la usona esperantistaro

memorando

detaloj pri kotizoj

CED funkcias nur dank' al la donacoj kaj la malgranda subvencio el la t.n. "Propaganda Konto" de UEA. (*)

Dum mia 6-semajna restado en Usono mi faris mian eblon - malgraŭ la ampleksa profesia laboro, kiun mi devis plenumi tie - por helpi almenaŭ iomete al la fortikigo de la Esperanto-Movado en via lando. La ĝentilaĵoj kaj senfina afableco de ĉiuj, kiujn mi havis la plezuron renkonti, multe superas mian modestan personan kontribuon. Tamen, el la vidpunkto de la interesoj de la Esperanto-movado, la plej bela kompenso estus, se en 1967 ĉiu Usona esperantisto estus almenaŭ MA de UEA.

Kaj se ankaŭ en la aliaj landoj okazus la samo, des pli bone!

Ivo Lapenna

(*) DETALOJ PRI KOTIZOJ

Por ĉiuj esperantistoj en Usono kaj Kanado, sed ne nur por ili !

MA = $ 7,50

Antaŭ ĉio, mi atentigu ke, kompare kun la vivnivelo en tiuj landoj, la kotizo de $ 7,50 por membro-abonanto (MA) estas tiel malalta, ke ĝi apenaŭ povas esti malhelpo por iu ajn. Je tiu sumo, eĉ ne unu, sed nur trikvaronan nokton oni povus dormi en mezgrada hotelo en New York, kaj nur tre modeste oni povus per tiu sumo duope vespermanĝi unufoje en agrabla restoracio. Kontraŭ tiu sama sumeto UEA donas, anstataŭ unufoje manĝaĵon, dum la tuta jaro ampleksan legaĵon, nome la monatan revuon Esperanto plus la utilegan jarlibron en du partoj. UEA povas tion fari nur, se la membronombro estas kiel eble plej granda kaj se tiuj, kiuj povas tion fari, donas pli fortan financan subtenon.

MS = $ 11,25

Tiucele oni povas aliĝi ekz. en la kategorio de membro-subtenanto (MS) kaj pagi $ 11,25 jare. MS ricevas ĉiujn eldonaĵojn, kiujn ricevas MA kaj la nomoj de MS aperas en la revuo Esperanto.

Pat. = $ 75

Fortan regulan apogon donas Patrono (Pat.), kiu pagas la dekoblon de MA-kotizo, do $ 75 jare. Mi varme rekomendas tiun kategorion al tiuj esperantistoj en la nordamerika kontinento (kaj aliloke), kiuj fakte povus elspezi tiun sumon

detaloj pri kotizoj

jare, ne estante devigitaj iel ajn limigi pro tio iujn aliajn elspezojn.

DM = nun $ 120, post 1.1.67 $ 150

La ĝenon de la ĉiujara kotizpagado kun danĝero de forgeso oni povas forigi, unue, donante al sia banko instrukcion aŭtomate ĉiujare en decembro transigi la kotizon en unu el la supraj kategorioj, aŭ, due, fariĝante dumviva membro. DM pagas unufoje por ĉiam sumon egalan al 20-oblo de la MA-kotizo. Kiel aparta avantaĝo, UEA akceptas ĝis 31.12.66 ankoraŭ la DM-kotizon surbaze de la MA-kotizo de 1966, do je $ 120. Ekde 1.1.1967 la DM-kotizo estos $ 150.

D-Pat. = nun $ 1200, post 1.1.67 $ 1500

Iufoje, jama DM bonstata deziras ankoraŭ plue helpi la Asocion. Por tia kazo ekzistas la ebleco fariĝi dumviva patrono (D-Pat.), kiu kotizo egalas al 10-oblo de la DM-kotizo, do nun ankoraŭ $ 1200 kaj post 1.1.67 $ 1500. En la nuna momento UEA havas unu tian membron - ne en Nord-Ameriko, sed en Svedujo - S-ron Per Edler. Tre volonte mi rekomendas al aliaj, ne lasi lin sola en tiu kategorio!

La nomoj de Patronoj, Dumvivaj Membroj kaj Dumvivaj Patronoj aperas en la revuo Esperanto kaj en la jarlibro.

1 % de la enspezoj

Aliĝinte en tiu plej alta kategorio, S-ro Edler deziris ankoraŭ plue helpi al UEA kaj tial li sendas al la Centra Oficejo ĉiumonate poŝtmandaton en valoro de 1 % de siaj enspezoj de la lasta monato. Imitinda ekzemplo, kiu eble povus inspiri aliajn . . .

Kien pagi?

Ĉiujn kotizojn kaj eventualajn donacojn por CED aŭ por aliaj fondaĵoj de UEA akceptas la ĉefdelegitoj: en Usono S-ro D. E. Parrish, 328 West 46th St., Los Angeles, Calif. 90037 kaj en Kanado S-ro W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave, Toronto 7, Ont., dum oni ĉiam povas simple sendi ĉekojn aŭ poŝtmandatojn ankaŭ rekte al la Centra Oficejo en Rotterdam.

Aliaj landoj

La agoj de S-ro Edler montras, ke ankaŭ en aliaj landoj povas leviĝi fortaj subtenantoj de UEA. Tial, tre volonte mi rekomendas ĉion ĉisupre menciitan ankaŭ al esperantistoj en Eŭropo kaj aliaj kontinentoj!

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

MEMORANDO

(daŭrigo de antaŭa paĝo)

La enketo havis la celon establi la kulturan kaj edukan valoron de instruado de Esperanto en la lernejoj. Ĝi montris, ke la lernado de la Internacia Lingvo donas multe pli kontentigajn rezultojn ol la lernado de la fremdaj naciaj lingvoj kaj ke, krome, la lernado de Esperanto (a) helpas al pli bona kompreno de la propra nacia lingvo, (b) faciligas la lernadon de fremdaj naciaj lingvoj, (c) kontribuas al pli efika lernado de pluraj aliaj objektoj, precipe de geografio kaj historio, (d) havas grandan valoron por kiu ajn formo de edukado al internacia kompreniĝo. Detaloj pri la enketo kaj analizo de ĝiaj rezultoj troviĝas en Doc. B/I/2 aldonita sub D/. Pli vasta enketo kaj pli profunda studo de tiu demando povus facile esti entreprenita de UN aŭ sub ĝiaj aŭspicioj. Ĝenerala enkonduko de Esperanto en la lernejojn ne nur ne signifus plian ŝarĝon de la instruprogramoj, sed, male, liberigus kaj tempon kaj energiojn por la urĝe necesa vastigo de instruado de aliaj objektoj por ĉiuj, inkluzive la fremdajn naciajn lingvojn por tiuj, kiuj efektive havas kaj talenton kaj inklinon por la lingvolernado.

6. **Konkluda Rimarko.** - En la nomo de ĉiuj subskribintoj kaj en sia propra UEA petas la Ĝeneralan Sekretarion de UN entrepreni la necesajn paŝojn por doni sekvon al la Propono, kaj la registarojn de la Ŝtatoj-Membroj apogi ĝian progresivan realigon. UEA deklaras sin preta liveri ĉiujn aldonajn informojn, kiuj povas helpi al plia klarigo de kiu ajn aspekto de la lingva problemo kaj de la solvo, kiun prezentas la Internacia Lingvo. Se montriĝos, ke estas necese studi la tutan problemon en aparta komisiono antaŭ ol fari la finan decidon, UEA insistas, ke en tiu komisiono troviĝu kiel egalrajtaj membroj almenaŭ kelkaj alte kvalifikitaj specialistoj pri lingvoscienco, pedagogio, internaciaj rilatoj, eventuale aliaj branĉoj, kiuj krom tio plene regas la Internacian Lingvon. Iliajn nomojn UEA komunikos en kiu ajn momento.

La radikala kaj definitiva solvo de la lingva problemo en la senco de la Propono — la plej impona iam prezentita al internacia instanco — estos unu el la plej gravaj kaj plej signifaj pozitivaj eventoj en la tuta kultura historio de la homaro kaj malfermos novajn perspektivojn por multe pli vasta kaj pli profunda interpopola kunlaborado sur ĉiuj kampoj, internacia kompreniĝo, progreso kaj paco. Ne malutilante al kiu ajn, ĝi prezentas senfinajn avantaĝojn por ĉiuj individuoj, ĉiuj nacioj, ĉiuj rasoj, por la homaro kiel tuto.

Rotterdam - New York, oktobro, 1966

Ekzekutiva Komitato de
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

NI ANKORAŬ KOLEKTU SUBSKRIBOJN!

Pliigi la premon al UN

Kvankam la Propono de UEA okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro jam estas prezentita al Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko, ankoraŭ ne estas klare, kian sekvon efektive donos al la afero la monda organizaĵo. Pri tio detale klarigas prof. Lapenna en la ĉefartikolo. Tial la Estraro de UEA ĵus decidis, ke necesas plu daŭrigi la kolektadon de subskriboj por kiel eble plej multe influi al UN, ke ĝi pozitive okupiĝu pri la Propono. Ankaŭ la Ŝtatoj-Membroj, kiuj jam ricevis la Proponon tra du kanaloj, tiamaniere venos sub pli fortan premon de la publika opinio, se ni povos daŭre vivteni la interesiĝon de la informaj medioj per freŝaj komunikoj pri la Propono.

La Centra Oficejo de UEA daŭrigos kiel ĝis nun la statistikadon de ricevataj subskriboj, kaj de tempo al tempo UEA informos la Sekretariaton de UN pri la novaj subskriboj. Por la perantoj kaj kolektantoj la C.O. povas ĉiam ankoraŭ liveri kvantojn da subskribofolioj kun teksto Esperanta, angla aŭ hispana.

Kompreneble, la tutmonda informado pri la transdono de la Propono jam kreis novan situacion, en kiu la publiko sendube estas pli bone informita pri Esperanto kaj pli favore rilatas al la Esperanto-movado. Sed ĝuste pro tio necesos adopti alian sintenon dum la varbado de subskriboj. Ni ja ne plu, kiel en la komenco, petas apogi proponon ĵus iniciatitan, sed ni petas aliĝi al propono jam apogita de preskaŭ unu miliono da individuoj kaj preskaŭ 4000 organizaĵoj. La kolektantoj devos kompreneble klarigi, ke la teksto de la Propono jam estas solene transdonita al UN (bonefike oni povas montri tiutemajn gazet-eltondaĵojn), sed ke UEA de tempo al tempo komunikos al UN la aldonitajn subskribojn, dum tiu organizaĵo ankoraŭ ne donis konkretan sekvon al la afero.

Mondaj reagoj al la transdono

Ankoraŭ ne eblas ricevi kompletan superrigardon pri la tutmonda eĥo en la gazetaro kaj radio al la komunikoj pri la transdono, eldonitaj de la C.O. en Rotterdam kaj de la Esperanta Informa Centro en Nov-Jorko. Se taksi laŭ la abundaj informoj, plejparte relative detalaj, aperintaj en nederlandaj gazetoj, la eĥon oni rajtas nomi kontentiga. La informojn publikigis tiel la urbaj kiel ankaŭ multaj provincaj gazetoj, kaj en iuj aperis longaj intervjuoj kun la Direktorino de la C.O. okaze de ŝia partopreno en la delegacio ĉe UN.

Kompreneble, la reago ne estis ĉie tia: en Usono, krom du radio-elsendoj kaj konciza informo en New York Times, la informaj medioj ŝajne preferis prisilenti la aferon. Sed eble poste la bildo plikompletiĝos. En Germanujo, aliflanke, la gazetaro volonte publikigis la informojn, ofte kun longaj artikoloj pri la lingva problemo. La Dua Germana Televido donis detalan informon kun bona komentario. En la Sarlanda Televido la ĝenerala sekretario de UEA havis mem okazon komentarii la okazaĵon. Ankaŭ en Pollando preskaŭ ĉiuj grandaj ĵurnaloj amplekse raportis, kaj samtempe ankaŭ ĉiuj stacioj de la Pola Radio. La Nov-Zelanda Radio jam la vesperon de la 6-a de oktobro elsendis la informon kun komentario de prof. Adcock pri la enkonduko de Esperanto kiel elektebla fako en nov-zelandaj lernejoj. (Intertempe la ĉefo de la parlamenta opozicio petis kompleton de la Memorando al UN kun la aldonaj dokumentoj.) Detalajn artikolojn aperigis la ĉefaj bulgaraj ĵurnaloj. La 2-a kanalo de la Malagasa Radio disaŭdigis intervjuon pri la Propono kun la Informa Fako de UFE en Parizo. Aliaj fragmentaj raportoj jam atingis la C.O. ankaŭ el Francujo, Aŭstrujo, Finnlando, Grekujo kaj Brazilo.

Kiel modelan ekzemplon, tamen, ni menciu la agadon de la Esperanto-Asocio de urbo Rosario, Argentino. El ilia ampleksa raporto ni ĉerpas nur la ĉefajn, sed ege elokventajn faktojn. Okaze de la transdono de la Propono Rosaria Esperanto-Asocio organizis 2 prelegojn, malfermis 4 kursojn (unu el ili intensa dektaga kurso), okazigis 3 solenajn kunvenojn (unu lige kun la Tago de UN), faris 8 radio-prelegojn de entute 70 minutoj, havis intervjuon en televido de Rosario, dissendis 2 000 cirkulerojn pri la Propono (ĉiuj lokaj ĵurnaloj raportis), informis en najbara urbo per aŭto kun laŭtparolilo kaj per distribuo de 2 000 flugfolioj, lokigis 200 afiŝojn en montrofenestroj kaj aranĝis Esperanto-ekspozicion.

En la venonta eldono ni klopodos kompletigi la bildon pri la mondaj reeĥoj kaj informos pri la nove aldonitaj subskriboj.

Sur la foto: membroj de la Esperanto-Societo Subotica, Jugoslavio, kun kursanoj. Kvar el la klubanoj kolektis pli ol po mil individuaj subskriboj. Entute la klubo varbis subskribojn de pli ol 23 000 el sume 82 000 loĝantoj !

AMO FINIĜANTA TRAGEDIE

ıara saikaku,
42-1693 (memportreto)

Kvin virinoj de amoro, de Ihara saikaku. El la japana tr. Miyamoto M. Serio Oriento-Okcidento n-ro 7. Eld. Pirato. Oosaka, 1966. 159 p. 21 x 15 cm., kun 42 ilustraĵoj. Tolbind. 13,— gld.*

La aŭtoro, Ihara saikaku, vivis en la 17-a jarcento kaj estis fama pri sia fekundeco en la kreado de hajkaj-poemetoj: en 1684 laŭdire en unu tagnokto li verkis 23 500 hajkajojn, do po 16 en minuto. La fekundeco certe estas legenda (la plejparto de la poemoj certe ne), sed, ĉar temas pri libro de la serio Oriento-Okcidento, ni nomu ankaŭ la grandan okcidentan rivalon Lope de Vega, kiu en tri horoj verkis tutajn dramojn aŭ komediojn en rimaj oktrokeoj.

La noveloj, kiel jam la titolo de la libro montras, temas pri amo, eĉ pri tre pasia amo, finiĝanta preskaŭ ĉiam tragedie. En ĉi tio ĝi diferencas de la noveloj de messer Boccaccio, ĉe kiu superregas la bonhumoro. Sed la fonto de ambaŭ aŭtoroj estas la sama: ribelo kontraŭ la morala digiteco de la feŭda socio. Kaj kiel ĉe Boccaccio la ribelon gvidas la leviĝanta burĝaro, tiel ĝin gvidas en Japanujo la "ĉoninoj", metiistoj kaj komercistoj. Sed tiuj "ĉoninoj" estis multe malpli potencaj, ol la itala burĝaro tempe de la renesanco, estis multe pli minacataj de la drakonaj leĝoj feŭdaj, kaj jen kio komprenigas la pli tragedian atmosferon de ĉi tiuj rakontoj. Responde al la librotitolo, la iniciaton en ĉi tiuj noveloj faras preskaŭ ĉiam la virinoj, evidente pro tio, ke ili devas defii ne nur la ĝeneralajn leĝobarojn, sed ankaŭ tiujn, kiuj rilatas speciale la virinojn, krome ili devis venki ankaŭ super siaj rivaloj, la njo-knaboj, kun kiuj la amvivo ŝajne estis tute sendanĝera.

La aŭtoro estas tre bona rakontanto, lerte plektas la fadenojn de la okazaĵoj kaj dum la objektiva rakontado jen kaj jen per ŝercaj eldiroj palpebrumas al la leganto, kvazaŭ por plifaciligi la pasie preman atmosferon. Ni havas per lia rakontado plenan impreson pri loke kaj tempe malproksima, ne tre dezirinda, sed tre interesa mondo. Mi mem tiel travivis tiun mondon, ke mi estis preskaŭ ŝokita, kiam mi ekvidis meze de la libro la bildon de la lerta tradukinto, Miyamoto, en eŭropaj vestoj: en mia tiama humoro mi preferus lin vidi, se ne en *katagino,* almenaŭ en *katabiro* kun larĝaj *tamotoj.*

La traduko estas lerte farita kaj plezure legebla, kelkfoje troviĝas esprimoj aŭ frazoturnoj gramatike neriproĉeblaj, sed iom nekutimaj; tiuj tamen ne ĝenas, eĉ helpas krei la interese fremdan etoson de la legaĵo. Riĉa glosaro kompletigas la libron. Ĝi mem estas plezure studebla kvazaŭ miniatura enciklopedieto de la japana vivo.

La libro, kiun enkondukas la vortoj de prof. Lapenna, estas tre bele eldonita kaj ilustrita per epokfidelaj bildoj. Certe ĝi valore pliriĉigas la orientan flankon de la serio Oriento-Okcidento.

Lajos Tárkony (Budapest)

Vuk, bestromano de István Fekete. El la hungara: Margit Leszkó. Il. Pál Csergezán. Eld. Corvina, Budapest, 1966. 82 p. 18 x 12 cm., bind.

Kortuŝa kaj rapide evoluanta rakonto por ĉiuaĝaj legantoj, tre taŭga por lerneja uzo. Vulpogepatroj Kag kaj Injo luktas por manĝigi ok idojn. Kiam ĉasistoj malkovras la vulpofortikaĵon, postvivas nur Vuk, kiu eskapis, kaj lia fratineto Injo, kiu estis kaptita kaj enkaĝigita. Helpate de sia parenco Karak, kiun li renkontas en la arbaro, Vuk fariĝas fama ĉasanto. Li kaj Karak liberigas Injon, sed ĉasistoj mortpafas Karak'on.

Ĉiu besto havas klarajn homajn trajtojn, kaj niaj simpatioj estas kun ili kaj ne kun la homaj rolantoj de la romano. La venĝo de Vuk pro la morto de lia familio malĝojigas la ĉasiston Borsos. "Komence malaperis lia favorata kato... poste anaso... kokino... anseroj. Borsos ŝiradis sian hararon... La ĉirkaŭaĵon de la domo li plenigis per kaptiloj, sed tiujn Vuk zorge evitis. Nur la hundo de la ĉefĉasisto ne estis tiom singardema, do, ĝi lamas..."

La vivo estas kruela. Kiel inter la homoj unuj englutas aliajn, tiel ĉe la bestoj tio ankaŭ okazas.

Raif Markarian (Britujo)

Bona rido... Komp. kaj tr. Axel. A. Helm. Eldona Societo Esperanto, Malmö 1965. 85 p. 19 x 12 cm., il. Anekdotaro. 5,25 gld.*

La libro entenas kolekton da ŝercoj. Ĝi estas presita en klaraj litertipoj, preskaŭ sen preseraroj. Alloga faras ĝin la moderne desegnitaj ilustraĵoj.

Estas malmultaj gramatikaj eraroj, sed la stilo estas iom peza. Surprizas la ofta uzado de 'nee' anstataŭ 'ne' kaj kelkaj 'ismoj', kelkfoje nekompreneblaj, ekz.: 'vidi la ombroflankojn de afero'; 'konduki iun malantaŭ la lumon'; 'doni al iu lardolipojn'; 'marista lumbaĵo'.

La celo, ridigi la legantojn, estas laŭdinda; ĉu ĝi estos atingita, dependas de iliaj mensoj, ĉar kelkaj eroj estas iom naivaj kaj multaj jam bone konataj. - Tamen la libro certe povas helpi al komencintoj, pliriĉigi sian lingvoscion per amuza legado. P. E. Schwerin (Aŭstralio)

Eterneco, legenda poemo de Amalia Núñez-Dubús. Eld. Hispana E-Federacio, Zaragoza, 1966. 13 p. 17 × 12 cm. *

La aŭtorino, konata el "Dek du poetoj" (1934), rakontas en 19 kvinjambaj strofoj draman legendon pri abato. La verketon bedaŭrinde makulas maltrafa vortuzo kaj amaso da preseraroj. V.S.

NOVAJ LIBROJ EL JAPANUJO

Utafesta poemaro. Eld. Oomoto, Kameoka, 1966. 104 p. 21 x 15 cm., il., bind. 7,20 gld.*

La duono de la poemaro konsistas el premiitaj poemoj, la dua parto enhavas poemojn, elektitajn el konkursmaterialo. La konkurso estis aranĝita por Uta-festo, kiu okazis en la kadro de Internacia Oomoto-Festivalo post la lastjara UK en Tokio. La konkurson partoprenis 73 personoj el 24 landoj (sume 171 kontribuaĵoj). La juĝkomisiono - 4 konataj japanaj esperantistoj - la unuan premion aljuĝis al neniu; anstataŭ ĝi akiris la duan premion 3 personoj. Entute estis premiitaj kaj laŭde menciitaj 14 poetoj; iliaj fotoj kaj biografiaj notoj troviĝas en la belaspekta kaj zorge eldonita libro. La unuan lokon okupas la poemo de Antonia-Maria Albert "Geometrio-Planimetrio". Laŭ la formo kaj enhavo ĝi estas interesa, filozofia, kiel ŝia poemo "Vokaloj", pli frue aperinta. La poemo estas konforme ilustrita kaj malgraŭ la nepoezia titolo elspiras poezion. En la premiita poemo de Masao Uejama temas pri Hiroŝima, ĝi pledas por la paco, por ke "brutala hombuĉad' okazu neniam plu." La sonetciklo "Serĉanto" de Gé Roelofs enhavas 15 sonetojn. Li komencas kaj bedaŭrinde ankaŭ finas sian filozofiadon per tio, ke "la vivo estas granda aventuro."

Vi trovos 35-strofan spiritisman riman rakonton, kiu vere ŝajnas rakonto kompare kun la mallongaj poeziaj hajkoj de Armand Su. El la junaj poetoj atentigas pri si Vilmos Benczik. Multajn nomojn de la poetoj ni bone konas, ekz. J. Kořínek, P. Lobut, Masajuki Kuroda, J. Balbin, L. Newell, M. Jakubcová, J. Cíchová.

H. Dresen (Soveta Unio)

La infanoj en vento, rakonto de Ĵoĵi Cubota. El la japana tr. Kiuzo Ito. Eld. Ĉiama Grupo, Kanazu, 1966. 72 p. 17 x 10 cm., ofsetita. 3,60 gld.*

Ĉu vi ekemis iam, kara leganto, grimpi sur plejsupron de arbego? ... Nu kompreneble, de post la jaroj, en kiuj la arbogrimpado estas prainstinkte obseda, rite sankta kaj mondsave gravega okupiĝo por ĉiu ... Ekde la tempoj, en kiuj mi komencis trovi pli allogaj la delikatajn formojn de ĉarmaj knabinoj ol la misteran ombron de arbegaj branĉaroj, mi ne plu pensis pri tiaj aferoj. Sed mi devas konfesi, ke dum lego de tiu ĉi libro mi denove ekhavis la deziron por arbogrimpado, pro sugestie memorveka efiko de la rave ĉarma, vere interesa verko, rakontanta vivon de petolaj knabetoj. Epokfara mondliteratura gravaĵo ĝi tamen ne estas. Amuza, malpeza verketo, kaj por infanoj krome distre edifa. Ja eble ĝuste tiu ĉi edifeco, la fina, iom naiva venko de la justo ĝin malhelpas esti elstare genia kreaĵo de sia speco, kiaj estas ekzemple en la mondliteraturo kelkaj similtemaj verkoj de Dickens, Daudet, De Amicis aŭ Collodi. Tamen, estis inde ĝin esperantigi. Ĝia plej granda valoro por la tutmonda esperantista publiko estas, ke ĝi alportas la japanan vivon, la japanan homon ne kiel kuriozaĵon, kiel heroe mistikan aperaĵon, kiel plejparte la japanaj verkoj, aperintaj ĝis nun en Esperanto tion faris; sed kiel vere homan, vive kortuŝan realaĵon.

La traduko de Kiuzo Ito estas flue bonstila, zorge kombita. Per trafa traduko de infanaj dialogoj li grave kontribuis al evoluigo de la familiara lingvo de Esperanto - sen abundego da nenecesaj neologismoj!

Andreo Szabó (Hungarujo)

Dudek horoj, kroniko de Ferenc Sánta. El la hungara tr. div. Eld. Corvina, Budapest, 1966. 234 p. 16 x 9 cm., plaste bind.

Naskita en 1927, la aŭtoro de ĉi tiu "kroniko" estas unu el la plej originalaj verkistoj de la lastgeneracia hungara literaturo, jam konata en sia lando pro siaj baladformaj poemrakontoj kaj pro la romano "La kvina sigelo".

"Dudek horoj" estas raportromano, kiu iom diverĝas, ĉefe el vidpunkto forma, de la pli fruaj verkoj de Ferenc Sánta. La aŭtoro pilgrimis kiel reportero al unu el la hungaraj vilaĝoj, pristudis ĝin, observadis kaj notis konfliktojn, problemojn, sentimentojn de la loĝantaro, fotografis unuvorte la vivon de la vilaĝo. La rezulto estas fidela portreto de la nuntempa hungara vilaĝano, en la kadro de la socipolitika situacio de la lando tra la lastaj dudek jaroj. La verkada metodo iom laŭas tiun de filmnoveloj: tra la objektiva, senpartia lenso de la kamero, Sánta rigardas la sortojn de siaj herooj kaj montras la dramajn interligojn, kiuj katenas tiujn sortojn unu al alia.

La esperanta traduko estas bona, kvankam oni ne povas ĝin konsideri tute senmakula: la laboron ni ŝuldas al kvar diversaj tradukistoj, kaj verŝajne ĝuste pro tio la lingva nivelo ne estas en ĉiu paĝo egala.

Giuliano Turone (Milano)

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Fervoja terminareto germana-Esperanta, Esperanta-germana, de Gernot Ritterspach. Eld. Germana Esperanta Fervojista Asocio, Frankfurt, 1966. 80 p. 16 × 11 cm. 5,85 gld. *

Diccionario Español-Esperanto (Vortaro hispan-Esperanta), de Hugo A. Lingua. Eld. Escuela Argentina de Esperanto, Rosario, 1966. 77 p. 27 x 22 cm., multobl.*

Hints for Speakers (Konsiloj por prelegantoj), de M. C. Butler. Eld. BEA, Londono, 1966. 9p. 22 x 14 cm., multobl.

First Lessons to Young Children (Unuaj lecionoj al junaj infanoj), de M. C. Butler. Eld. BEA, Londono, 1966. 33 p. 22 x 14 cm., multobl.

* *Mendu ĉe UEA*



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

LA TURISMA FAKO DE TEJO RAPORTAS:

La Internacia Esperanto-Tendaro de Amikeco okazis en Funka, Polujo, en julio, kiel daŭrigo de la antaŭaj tendaroj "BANJO". En septembro sekvis ekskurso laŭ "Vojoj de Kopernik". Ambaŭ aranĝojn partoprenis pli ol 40 esperantistoj el Bulgarujo, Norvegujo, Usono kaj Polujo.

"Pollando - lando, homoj, historio" estis la temo de la Internacia Seminario de Studentoj-Esperantistoj, en Lodz. Ĝi havis grandan sukceson; ĉeestis i.a. la Rektoro kaj aliaj gravaj aŭtoritatuloj. Pli ol 60 esperantistoj (ankaŭ el Japanujo kaj Ĉeĥoslovakujo) partoprenis. Ĝin aranĝis Stud. Esp.-Klubo "Signalo".

TURISMA SERVO DE TEJO ANONCAS:

1. De 27 dec. ĝis 4 jan. okazos la 2-a Internacia Vintra Feriosemajno de PEJ kaj STELO, en Zakopane, Polujo. Ekskursoj kaj skiadoj alternos kun prelegoj, diskutoj kaj amuzvesperoj. Limaĝo: 30 jaroj. Kotizo: 500 zl. Informan bultenon petu de Andrzej Grzebowski, Curie-Sklodowskiej 10/1, Bydgoszcz-9, Pol.
2. De 20 ĝis 28 aŭgusto 1967 PEJ kaj la Pola Oficejo de Eksterlanda Turismo por la Junularo "Juventur" antaŭvidas Internacian Turisman Kunvenon de Esperanto-Junularo, en Bydgoszcz. La kunvenon oni aranĝas speciale en la kadro de la "Internacia Jaro de Turismo". Post ĝi okazos 10-taga ekskurso tra nord-orienta Polujo, laŭ Zamenhof-vojo.
3. III-a Internacia Esp.-Seminario en Torun de 28 apr. ĝis 3 majo.
4. Ankaŭ en Torun okazos la 2-a STELO-kongreso, 18-20 aŭg. 1967.

Ĉiujn informojn petu de la Turisma Servo de TEJO kaj PEJ ĉe A. Grzebowski.

El "Junulara Kuriero", gazeto de JEOM.

Kiel ĉiujare la Esperanto-kursoj en Tananarive ekfunkciis en septembro kaj oktobro. Antaŭ la komenciĝo ni faris alvokojn per la radio; rezulte pli ol 40 personoj enskribiĝis. Post kelkaj monatoj deko ne kuraĝis ellerni, sed la aliaj bone progresis.

Antaŭ nelonge ni faris tute novan alvokon, kaj 100 personoj respondis kaj aldoniĝis al la antaŭaj. Nuntempe kvin klasoj de la komerca ĉambro estas plenplenaj. Ni ne kontentiĝas nur je tio, sed intencas krei vesperajn kursojn por oficistoj, kiuj ne povas sekvi la ĉiusabatan kurson. Nur restas malfacile aranĝeblaj la kursoj por provincanoj.

Nun funkcias kiel kursgvidantoj: s-ro Rasoanaivo Frederiko, Eugène Raveloson, Désiré Rabevazaha, Randrianasoloarivelo kaj f-ino Elisabeth Vaosoloharifidy.

GERMANA ESPERANTO-JUNULARO KAJ NEDERLANDA ESPERANTO-JUNULARO invitas al komune organizata Eŭropa Junulara Konferenco en **Enkhuizen,** Nederlando. En pitoreska sed komforta studenta hotelo, aranĝita en antikva fortikaĵo, la partoprenantoj aŭskultos prelegojn pri la temo "Miljara lukto kontraŭ la maro", kaj partoprenos kvar ekskursojn al la koncernaj "batalkampoj", t.e. la kontraŭmaraj kluzoj, la polderigaj laboroj, ktp.

Datoj: 19-29 aŭgusto 1967, kotizo 160,– gld., pliaj informoj ("Unua Komuniko") haveblaj ĉe Wim Jansen, Röntgenstraat 32-a, Vlaardingen, Ned.

LA UNUA ARGENTINA ESPERANTISTA JUNULARA KONGRESO okazos de 5 ĝis 8 januaro 1967 en Rio Ceballos. La precipaj temoj rilatos la laboron de la junularo en la Esperantomovado, sed oni ankaŭ parolos pri edukado lerneja kaj eksterlerneja. Konkurso de la plej bona eseo pri tiuj temoj estas anoncita en la bulteno de ArgEJO: "Perspektivo".

PLURAJ VOLONTULOJ SIN ANONCIS POR INSTRUADO EN LA MUELEJOJ DE METILERNANTOJ dum la somero de 1967. Se tamen venos pli da sinanoncoj de personoj kapablaj instrui Esperanton kaj/aŭ gvidi amuzajn programojn dum kelkaj semajnoj por grupoj de junaj volontuloj en Francujo, la kursoj povos okazi eĉ pli amplekse kaj longdaŭre. Legu LJV-nov., kaj eventuale petu stencilitan raporton de la red. LJV.

Ankaŭ en la Brazila provinco Guanabara la junularo aktivas. Dum la somero de 1966 Guanabara Esp.-Junularo organizis vizitojn al NEJOj: Spiritisma Junularo, Oratora klubo Demóstenes, kaj Portugala Unuiĝo de Studentoj. Rezulte de tiuj vizitoj kaj prelegoj nun estrarano Jair Salles gvidas kursojn en ili. Krome oni renkontiĝis kun la Esperantista Junularo de Campo Grande kaj la Esp.-Asocio de Rio de Janeiro. Regule aperadas la bulteno "Meteoro".



La foto montras prezentadon dum la "Nokto de l'Prozo" - unu el la pluraj kulturaj eventoj aranĝitaj de GEJ.

LAŬFAKE

Edukado

• Reciprokajn ekspoziciojn de infandesegnaĵoj povis aranĝi por lokaj lernejoj la Esperanto-grupo de universitato en Kakaŭa, Japanujo, kaj la delegito de UEA en Quedlinburg, Germanujo.

Komerco

• La aŭto-firmo FIAT ĵus produktis siajn trian kaj kvaran kolorfilmojn kun parolo en Esperanto. Titoloj: "Operacio sekureco" kaj "FIAT 124". Esperanto-organizaĵoj povas senpage ricevi ilin en formato 8 aŭ 16 mm. ĉe Direkcio Stampa e Propaganda, FIAT, Torino, Italujo. Broŝuroj en Esperanto ĵus aperis pri FIAT 124, kaj pri la Internacia Aŭto-Ekspozicio en Torino.

LAŬLANDE

Belgujo

• La 14-an kaj 15-an de januaro samtempe festas sian 60-jaran jubileon la antverpena grupo "La verda stelo" kaj duoblan jubileon (40 jarojn grupa prezidanto, 50 jarojn esperantisto) s-ro Maurice Jaumotte. La programo inkluzivas orgenkoncerton, balon, diservon, akcepton en la urdomo kaj aliajn solenaĵojn.

Brazilo

• Agrokultura kooperativo el gepedagogoj kaj orfaj geknaboj konstruas vilaĝon "Bona Espero", kies ĉiutaga lingvo estos Esperanto. Ili jam posedas 800 hektarojn da agroj, traktoron, kamionon kaj dombestaron. Adreso: Ranato Lemos Diniz, Bona Espero, Cidade de Alto Paraiso, Goiás 6.

Germanujo

• Kadre de la Foiro de Leipzig okazos la 11-an de marto 1967 internacia renkontiĝo. Informas: Esperanto-amikoj en Germana Kulturligo, DDR-701 Leipzig, Käthe-Kollwitz-str. 115.

• Ekskluzive al Esperanto-literaturo estas rezervita unu montrofenestro de la vendejo "Das Internationale Buch", sur strato Unter den Linden, Berlino.

• La eldonejo "Zeit im Bild", Spenerstr. 21, DDR-8019 Dresden, anoncas en sia katalogo, ke ĝi eldonos ankaŭ en Esperanto. Al petantoj ĝi sendos detalajn informojn.

Japanujo

• Ankoraŭ unu internacia geedziĝo per Esperanto: la 22-an de oktobro geedziĝis en Tokio s-ro Wilhelm Schmid, redaktoro de "La Praktiko" kaj antaŭa oficisto de UEA, kun f-ino Jošiko Kaĵino, konata pro sia monda prelegvojaĝo antaŭ kelkaj jaroj.

• La 13-an de septembro forvojaĝis al Hindujo post pli ol unu jaro da instru-restado s-ino M. Haudebine, senditino de UEA en Azio.

Kanado

• Ĉu la Mondekspozicio en Montreal en 1967 uzos Esperanton? Tio dependas plejparte de la nombro de legantoj, kiuj reagos ankoraŭ al la tutpaĝaj anoncoj aperintaj en "Esperanto" de majo, septembro kaj oktobro. Skribu al la Ekspozicio por peti informojn, menciante la reklamon en "Esperanto".

Koreujo

• Korea Esperanto-Societo okazigas 200-personan kurson sub aŭspicio de ĵurnalo Choseon en Seulo, kaj post ekspozicioj, prelegoj kaj kursoj fondis grupojn en 9 universitatoj. Korea Esperanto-Instituto en Taegu organizis la 7-an Korean Esperanto-Kongreson tie je 29-30 oktobro.

Soveta Unio

• Kun oficiala aprobo fondiĝis Esperanto-klubo en la Universitato de Moskvo. Post solena fondo-vespero enskribiĝis por kursoj ĉ. 100 personoj.

• La prezidanto de la Uzbeka Esperanto-Komisiono elektiĝis estrarano de Uzbeka Amikeca Asocio pro sia efika agado per Esperanto. Okazas kursoj por 7 aktivuloj de la Amikeca Asocio kaj por 30 gejunuloj-komencantoj.

Svisujo

• La deka skirestado en Adelboden (1400 m) okazos je 26 dec.-4 jan. Informas detale s-ino Andrée Gacond, Miéville 133, CH-2314 La Sagne.



S-ro M. Jaumotte: du jubileoj (vidu sub Belgujo

Orient-Berlîna montrofenestro (vidu: Germanujo)



52-a UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO
Tel Aviv, 2-9 Aŭgusto 1967

Alta Protektanto: Zalman Ŝolar, Ŝtatprezidanto de Israelo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

No. 2 La 3-an de nov. 1966

OFICIALA KOMUNIKO

Kongresaj datoj.

Ni atentigas ke, pro specialaj lokaj cirkonstancoj, la 52-a U.K. ne okazos, kiel la ĝisnunaj Universalaj Kongresoj, de sabato al sabato, sed ĝi okazos de merkredo al merkredo.

Limdato.

Ni ankoraŭfoje atentigas ke la aliĝoj por la 52-a U.K. estas akceptataj ĝis la 22-a de junio. La limdato indikita sur la aliĝiloj (30/6/1967) estas sekve nevalida.

Dua Bulteno.

En la mezo de januaro 1967 estas antaŭvidita la apero de la Dua Bulteno, en kiu troviĝos i.a. precizaj informoj pri la loĝadebleco en Tel Aviv kaj pri la kongresaj ekskursoj. Ĝis la apero de la Dua Bulteno la aliĝintoj bonvolu ne skribi al la Kongreso pri tiuj temoj.

Glumarko.

Estas aĉetebla ĉe la Libro-Servoj de la Landaj Asocioj kaj de U.E.A. bela kolora glumarko eldonita okaze de la 52-a UK. Prezo: 0,50 ned. gld. (2.- st.) por 10-glumarka folio.

Israelaj popoldancoj

Statistiko (je 3/11/66).

Arg. 1, Aŭstral. 3, Aŭstr. 3, Belg. 7, Braz. 2, Brit. 15, Bulg. 26, Ĉeĥosl. 16, Danl. 2, Finn. 3, Franc. 47, Germ. 9, Hisp. 2, Hongkongo 1, Hung. 35, Isrl. 17, Ital. 12, Jap. 3, Jug. 19, Kan. 1, Monako 3, Ned. 18, Norv. 3, Nov-Zel. 1, Poll. 82, Port. 2, Rum. 1, Sovet. 1, Sved. 17, Svis. 3, Usono 8, Ven. 1. Entute 364 el 32 landoj.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

PARTOPRENU EN LA AVIADILA KARAVANO DE UEA !

Vidu detalojn sur p.p. 116-117 en la junia kaj p. 179 en la novembra numeroj de la revuo Esperanto 1966. Petu pliajn informojn kaj aliĝilon ĉe la Centra Oficejo.

Komuniko de la Prezidanto

En kelkaj komunikoj, publikigitaj en "Esperanto", kiel ankaŭ en pluraj cirkuleroj, mi informis la membraron, ke pro foresto el Anglujo mi ne povus plenumi mian funkcion ĝis la fino de la jaro 1966. Mi afable petis, ke dum tiu periodo oni ne skribu al mi, sed turnu sin aŭ al la vicprezidanto, s-ro Wensing, aŭ al la ĝenerala sekretario, aŭ al la C.O., depende de la kompetentecoj. Malgraŭ tiu peto, plurfoje ripetita, mi trovis en mia hejmo, post la reveno el New York, tian amasegon da korespondaĵoj, ke la nura malfermado — por ne paroli pri la legado — daŭros kelkajn tagojn. Sekve, konforme al miaj antaŭaj atentigoj, tiuj korespondaĵoj aŭ entute ne povos esti responditaj, aŭ tio okazos kun tre granda prokrasto. Mi tion tre bedaŭras, sed certe ne kulpas, ke oni ne atentis eksplicitajn petojn.

Kie legi la prelegojn de la
INTERNACIA
SOMERA UNIVERSITATO

(Vidu ankaŭ "Esperanto", julio 1965, p. 127)

ISU 1964, Hago

PANCER, prof. Oton: "Donante al la homo pli da fruktoj ni plilongigos ĝian vivon", Scienca Revuo vol. 16, 1965 n-ro 1 (61), p. 27-33.

POPOVIĆ, prof. Boža: "Vivo de homo sur aliaj planedoj", Okcident-Germana Revuo, 1965 n-roj 4, 5, 6; 1966 n-ro 1.

ISU 1965, Tokio

STØP-BOWITZ, prof. C.: "Ĉu organismoj travivis la glaciepokon en la nordo?", Scienca Revuo vol. 1965 decembro, n-ro 2 (62), p. 57-67.

SUZUKI, prof. Masao: "Elektreco kaj vivaĵoj", Medicina Internacia Revuo, vol. 1, n-ro 4, 1965 novembro, p. 74-82.

LEWIN, d-ro R. A.: "Algoj", Scienca Revuo vol. 17, 1966 aŭgusto, n-ro 2 (66), p. 65-67.

HEREDAĴO RAVESTEIN-BASTERS

De tempo al tempo UEA ricevas malgrandajn kaj kelkfoje ankaŭ grandajn heredaĵojn de siaj mortintaj membroj.

Kvankam la Estraro, baldaŭ post la morto, ekscias pri la testamentaĵo, ofte ne eblas jam publikigi pri ĝi. Se la heredaĵo ne konsistas el fiksita monsumo, ofte la grandeco de la heredaĵo aŭ la valoro de la ricevota(j) objekto(j) ne estas konata. Pro tio ni nur nun povas sciigi al niaj membroj pri la heredaĵo, kiun UEA ricevis de sia membrino, sinjorino J. M. Ravestein-Basters, kiu mortis en Hago la 21an de majo 1965.

La divido de la valoraĵoj, kiujn s-ino Ravestein postlasis, okazis konforme al ŝia testamento per notaria akto de la 7a de oktobro 1966. UEA ricevis kune kun kvin nederlandaj bonfaraj kaj sociaj unuiĝoj akciojn kaj obligaciojn. La sesona parto por UEA havas valoron, rondcifere, de 26 500,— guldenoj. UEA kaj ankaŭ la nederlandaj unuiĝoj, tamen ne povas disponi pri la valorpaperoj kaj iliaj fruktoj, ĉar la fruktoj estos por la vidvo kaj parencoj ĝis iliaj mortoj. Dum tiu tempo banko prizorgos la kapitalon.

La nomo de s-ino J. M. Ravestein-Basters estos enskribita en la oran libron de UEA. Ne eblas danki al mortinto. Ĉi tie ni nun volas esprimi dankon al tiuj, pri kiuj ni ne scias, sed kiuj same kiel s-ino Ravestein faris testamenton, en kiu ili decidis postlasi ion al UEA.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1966

stato je la 31-a de oktobro

Konkurso I

		lando	kvoto	poentoj	%
1.		Hispanujo	2860	3200	111,89
2.		Belgujo	2055	1960	95,38
3.		Britujo	6691	6291	94,02
4.	(5)	Francujo	7752	7217	93,10
5.	(4)	Usono	4526	4195	92,69
6.		Svedujo	7180	6400	89,14
7.	(13)	Germanujo	7221	6420	88,91
8.	(7)	Danlando	3099	2650	85,51
9.	(8)	Nederlando	5975	5041	84,37
10.	(9)	Italujo	4253	3400	79,94
11.	(10)	Finnlando	3160	2470	78,16
12.	(11)	Svislando	2459	1830	74,42
13.	(12)	Brazilo	4142	3052	73,68
14.		Japanujo	3965	2475	62,42
15.		Jugoslavio	5560	3355	60,34

Konkurso II

1.		Kanado	842	1109	131,71
2.		Israelo	460	585	127,17
3.		Sudafriko	250	260	104,—
4.		Grekujo	270	266	98,52
5.		Aŭstralio	1475	1395	94,58
6.		Aŭstrujo	1475	1295	87,80
7.		Nov-Zelando	1481	1300	87,78
8.		Norvegujo	1755	1410	80,34
9.	(10)	Islando	250	175	70,—
10.	(9)	Argentino	905	630	69,61
11.		Madagaskaro	250	30	12,—

(Vidu la regulojn sur paĝo 39. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn).

LA ENHAVTABELO 1966,

kiu kutime aperas en la decembra eldono de "Esperanto", pro teknikaj motivoj ĉi-foje aperos nur kun la januara. Ĉiuj abonantoj de 1966 ricevos ankaŭ tiun eldonon de 1967, aŭtomate.

NOVAJ DELEGITOJ

Vidu la Jarlibron 1967/I, aperontan en marto.

VAKAS

Bulgarujo. Sofia: FD (Vegetarismo).
Danlando. Århus: FD (Invalidaj aferoj).
Francujo. Brezolles: FD (Vojoj). Douai: D.
Germanujo. Baunatal: D. Bielefeld: D & FD (Virinaj aferoj). Dörnigheim: D. Hagen: FD (Komerco). Heidelberg: FD (Interpretado). Osnabrück: D. Remscheid: D. Wehringen: D.
Hispanujo. Alberique: D. Oliva: D. Palencia: D. Sabadell: FD (Literaturo kataluna).
Italujo. Bosa: D. Bientina: D, FD (Instruado). Calci: D & FD (Prilaboro de ledaĵoj). Caorle: D. Meolo: JD. Piombino: D. Pisa: FD (Biologio). Torino: FD (Scienco). Trieste: JD, FD (Ĥemio). Verona: FD (Komerco).
Japanujo. Itikawa: D. Kioto: D. Simotuma: D, FD (Edukado). Tiba: FD (Mikrobiologio). Tokio: FD (Komerco).
Jugoslavio. Petrinja: D, FD (Instruado). Sarajevo: FD (Instruado), FD (Instruado teknika). Slav. Brod: D. Slav. Požega: D, FD (Turismo). Split: FD (Dentistaj aferoj).
Kuvajto. Kuwait: D, FD (Parapsikologio).
Maroko. Meknes: JD.
Nederlando. Maastricht: JD, FD (Horloĝoj). Wassenaar: D, FD (Ĉarpentado), FD (Turismo).

ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la oktobran eldonon.

RADIO ROMA. Vidu programon kaj ondlongojn en la novembra numero.

SVISA RADIO nun dissendas la vesperan programon pli malfrue. Jen la modifita plano de la elsendoj: lunde kaj merkrede de 12.00 ĝis 12.10 per ondoj 48,66 m (6165 kcs), 31,46 m (9535 kcs), 16,88 m (17770 kcs), 13.98 m (21460 kcs): ĵaŭde kaj sabate de 21.45 ĝis 21.55 per ondoj 48,66 m (6165 kcs), 31,46 m (9535 kcs), 25,40 m (11810 kcs). La ondoj 25,40 m, 16,88 m, kaj 13,98 m estas speciale direktataj al Afriko kaj landoj de orienta Mediteraneo. Prelegas lunde kaj ĵaŭde d-ro A. Baur, merkrede kaj sabate s-ro C. Gacond. Raportoj pri aŭskultado, sugestoj, kritikoj ĉiam estas deziratajn. Skribu al Svisa Radio, S.O.C., 3000 Bern-16, Svislando. Programkajero estas eldonata dufoje en la jaro kaj sendata al aŭskultantoj laŭ peto.

Norvegujo. Oslo: FD (Filatelo).
Nov-Zelando. Palmerston North: D.
Portugalujo. Barreiro: D. Funchal: D, FD (Inĝenieraj aferoj). Lisboa: D, FD (Filatelo), FD (Medicino), FD (Presado), FD (Turismo). Paiço-Lavra: D. Póvoa de Lanhoso: D. Setúbal: D. Silveira: D, FD (Geografio). Vila Real: D.
Rumanujo. Bucureŝti: D, FD (Studentaj aferoj), FD (Geografio).
Svedujo. Falun: VD, FD (Libro-bindado). Hudiksvall: D. Korsnäs: D. Kristianstad: D. Lärje: D. Tibro: D.
Svislando. Vevey: VD, FD (Pripacaj aferoj). Zürich: FD (Filozofio Krishnamurti), FD (Religio Martinus).
Turkujo. Ankara: D. Istanbul: VD, FD (Komerco), FD (Medicino).
Usono: Jersey City: D. Monticello: D. Pittsburgh: FD (Trafiko industria). Placerville: D. Stevens Point: D. Tacoma: FD (Edukado). Taunton: D. Tucson: FD (Astronomio).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Crockett, s-ro Kirk, Ottawa, Kanado.

Fairbairn, s-ro E. Anthony, Cheadle, Britujo.

DONACOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Aŭstrujo: Rentmeister, s-ro F. W., 1,07. Britujo: Esp.-Soc. de Norda Kimrujo, 5,—. Francujo: Guillot, s-ino S., 7,50; Plouy, s-ro Jean, 7,50. Kanado: Salt, f-ino Betty, 3349,21. Usono: Shanks, s-ro W.A., 7,50.

FONDAĴO CANUTO

Danlando: Jørgensen, s-ro Gunnar, 2MA. Francujo: Llech-Walter, s-ro R., 1 J-MJ.

Ĉiu kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto omaĝe al la prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto. En tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

DONACO POR INTERNACIA ARTA TEATRO

Finnlando: Kostiainen, s-ro V. J., 3,60 gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. M. H. Vermaas, Direktorino C.O.

ANONCETOJ

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

Helpon ! Mi preparas disertacion en pedagogia seminario, serĉas informojn pri historio, desegnoj kaj kutimoj rilataj al fingro-ringoj en diversaj landoj. Reciprokos per belaj bildkartoj filatele afrankitaj. Ann Gallifent, Charlotte Mason College, Ambleside, Westmorland, Anglujo.

Mi serĉas kontakton kun la tuta mondo. Mi estas 33-jara kaj edziĝanta. Skribu al s-ro H. G. Beverloo, Beekmanstr. 11, Dordrecht, Nederlando.

La libroj en la H. C. Andersen-serio de KOKO estas tradukitaj rekte el la danaj originaloj. En kunligo kun eminenta traduko tio konservis la specialan Andersen-stilon, ŝatatan ĉie en la mondo. Petu senpagan prospekton ĉe Eldonejo KOKO, Jyllinge, Roskilde, Danlando.

Ĉu toleremo estas naivaĵo ? Ĉu malagrablaĵoj povas esti utilaj por la homo ? Ĉu sufero havas nobligan efikon ? Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Ges-roj Mag. Mag. Anna kaj Isaj Dratwer petas ĉiujn korespondaĵojn al ili sendi laŭ la adreso: Bat Jam, Ramat Josef, poŝtkesto 419, Israelo. Oni ne sendu korespondpetojn!

Senpagan ekzempleron de mia libreto Dekdu Piedetoj mi sendos al la kvin personoj, kiuj plej bone helpas mian lernantinon Ann Gallifent. (Vidu supre.) - Marjorie Boulton.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Bonvolu malpezigi la sorton de samideano, kuŝanta paralizita en hospitalo, sendante al li poŝtkartojn kaj leterojn kun poŝtmarkoj el ĉiuj landoj. Respondo garantiita. Adreso: S-ro Hermano Hoogland, Dijkzigt Ziekenhuis, Dr. Molenwaterpl. 40, Rotterdam, Nederlando.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Grajnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Grajnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Filatelisto deziras interŝanĝi p.m. kun ĉiuj landoj — kontraŭ 100/200 diversaj, sendas samon el Francujo. S-ro R. Melo, 15 rue de la Richelandière, F-42 Saint Etienne, Francujo.

LAVESPA, kiu estas mondmovado al invalidoj kaj handikapuloj, deziras kontakti geamikojn de tuta mondo. Skribu al s-ro Manuel M. Heidun, Vestergade 53, Strib. Danlando.

Centra direkcio de Itala Nacia Malsan-Asekuro pristudas la eblecon adopti Esp. en rilatoj kun eksterlandaj saminstitutoj. Bv. precipe samfakanoj el la tuta mondo kuraĝigi ĝin skribante al "Direttore Generale INAM, via Pianciani 5, Roma (Italujo)," bondezirante plenan sukceson al tiu grava iniciato.

Mi kolektas malnovajn Esperantajn revuojn. Kiu deziros interŝanĝi skribu al mi. S-ro R. Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Lokaj grupoj! Interŝanĝu lumbildseriojn kun sonbenda komentario, laŭ la Laborplano de la JIK, (c) (iii). Por aliĝi al rondo, en kiu cirkulos proks. unuhoraj lumbildserioj, grupoj anoncu sin ĝis majo 1967 al la provizora peranto: L. Rýznar, JKP Esperanto-Grupo, Svitavy, Ĉeĥoslovakujo.

Por sukcesi kaj feliĉadi jen via gvidilo: "Monoteismo kaj Pozitiva Moralo" de Emil Gasse. Mendu al UEA aŭ ceteraj Libroservoj. Gld. 4,20; st. 16,80 + 10%.

S-ino Dragica Vladetic (antaŭe Štimac) informas pri nova adreso: 121 Burris St., Hamilton (Ont.), Kanado. Pardonpetas al geamikoj pro neskribado.

LANTERNO

sendependa internacia gazeto

KULTURO - POLITIKO - EKONOMIO

Petu senpagan provekzempleron!

Redakcio de «LANTERNO»

D-8 Munchen 25, Postfach 473

KOLEKTU ANKORAŬ SUBSKRIBOJN

por la Propono

al U.N. !

Nepre vidu la artikolon sur p. 181 !

Petu provizon da subskribofolioj de via landa asocio aŭ rekte de UEA

Fondita en 1952a

Famkonata tra la mondo

LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kastelo "Grésillon" -49- Baugé - Francujo

En verda franca regiono "Val de Loire" estas ideala internacia rendevuo por familioj aŭ izoluloj. — Agrabla kastelo, parko, banejo, ludterenoj, sana nutrado, belaj ekskursoj

El la programo 1967a

Jam planitaj estas la periodoj:

24/3 - 31/3 :

Paska Kultura Semajno; ĉefe por gejunuloj

2/7 - 23/7 :

Diversgradaj E. Kursoj, Ekzamenoj, Fak-renkontoj, Ekskursoj

23/7 - 6/8 :

La ĉiam suksesaj: "INTERNACIAJ TURISMAJ kaj KULTURAJ FERIOJ", kun altvaloraj prelegoj de diversnaciaj eminentaj parolantoj

6/8 - 27/8 :

Kulturaj Esperantistaj Semajnoj: E. Kursoj, bindado, korbo-farado, ludoj, gajaj vesperoj

27/8 - 10/9 :

Studperiodo organizata de U.F.E. Kursoj, konversacioj; ekzamenoj, promenadoj

ALIĜU FRUE

La E. Kulturdomo estas je la dispono de grupoj por - laŭ ebleco - organizi pluajn E. Renkontojn aŭ feriojn pli malpli longajn.

ESPERANTO

estas la plej internacia Esperanto-revuo en la mondo, kun legantoj en 83 landoj

ESPERANTO

estas via revuo kaj dependas de via apogo

Diskonigu ĝin ! Varbu por ĝi

abonantojn (18,75 gld. jare) kaj

Membrojn-Abonantojn (25,— gld. jare)

Petu kvanton da aboniloj de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

Sendigu specimenan ekzempleron al viaj amikoj ne-abonantoj

IVO LAPENNA

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

La Unua Parto konsistas el 16 paroladoj faritaj inter 1950 kaj 1966 dum la Universalaj Kongresoj aŭ en aliaj okazoj, inkluzive la pledojn por Esperanto en la Ĝeneralaj Konferencoj de UNESKO en Parizo (1952) kaj Montevideo (1954).

La Dua Parto enhavas tri tekstojn pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj, D-ro L. L. Zamenhof kaj U.E.A., kiuj povas esti taŭge utiligataj aŭ komplete aŭ parte ankaŭ por prelegoj, radioelsendoj, artikoloj aŭ informoj.

ĈIU leginto de RETORIKO, **ĈIU** persono, kiu iam aŭdis la aŭtoron paroli, certe havigos al si tiun ĉi libron, kies enhavo iusence signas la etapojn de evoluo de la Esperanto-Movado en la eventoplenaj 16 jaroj, al kiuj ili rilatas.

Eldono de la aŭtoro.

Proks. 150 pp., formato 20 x 15 cm (kiel Retoriko), plaste bindita.

Prezo: 11 gld. aŭ 44 steloj. Mendu ĉe UEA !

Japana ĝenro

UKIJOE

SIGELMARKOJ ! !

3,7 x 5,5 cm 10 bildoj

Belaj
Multkoloraj
Majstraĵoj
Sur japana papero, de la famekonataj Majstroj:
HOKUSAI
HIROŜIGE
UTAMARO k.t.p.

Prezoj
(kun afranko)
1 folio: 4 irk aŭ $ 0,5
5 folioj kun 1 bildo 7,5 x 11 cm: 17 irk, $ 2
10 folioj k. japana esp. 35 p. libro: 30 irk, $ 3,75

Mendu ! !
al ESPERO
P.O.Box 18, TURUMI, YOKOHAMA,
JAPANUJO

Por ĉiaj eventoj povas liveri artoplenajn florajojn tutmonde:

FLORDOMO

Eline

Esperanto parolata

WERELD BLOEMEN EXPRESSE
INTERFLORA
FLEUROP

STEVINSTRAAT 260 – SCHEVENINGEN
TELEFONO : 55 66 76 NEDERLANDO

Ĉu vi serĉas revuon

kiu enhavas interesajn artikolojn pri

popularaj temoj,

kun grandformataj trafaj ilustraĵoj,

kiu vere "instruas kaj amuzas" ?

Do vi bezonas la monatan bildrevuon

LA PRAKTIKO

Eldonas : UEA

La administra maŝino de Universala Esperanto-Asocio kaj la redaktado de Wilhelm Schmid garantias regulan, akuratan aperadon kaj aktualan enhavon.

Jarabono: 10,— gld. (40 steloj). Kotizoj per la ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA aŭ rekte al UEA, Rotterdam, poŝtkonto no. 378964.

"Reĝo Lear faras decidan antaŭpaŝon en la kampo de la viva dramo."

A. D. Foote en British Esperantist

"La fideleco, al kiu la tradukinto celis, estas plene atingita, kaj al tio nenio estas oferita el la majesta poezio de la originalo."

D. B. Gregor en Heroldo

"Neniu franca traduko povas atingi la altan gradon de ekzakteco trovebla ĉe la Kalocsay-a traduko."

Robert Martin en Franca Esperantisto

"Kalocsay pruvis ankoraŭfoje sian majstrecon. Mi havas la impreson, ke Reĝo Lear estas lia atuto."

William Auld en la revuo Esperanto

REĜO LEAR

Tolbindita: 16,50 gld. Broŝurita: 14,— gld.

Eldonita de UEA